

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Fondinto : H. HODLER, Redakcio Dro Edmond PRIVAT kaj Hans JAKOB, Direktoro de UEA.
ADRESO DE LA REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO : 12, Boulevard du Théâtre, Genève.

REDAKCIO: *La Redakcio ne povas resendi manuskriptojn.*

*Lasta dato por ricevo: 1-a de ĉiu monato
por la sekvanta monato.*

Oni skribu tre legeble kaj konservu kopion.

La abonoj komenciĝas en Januaro.

ABONO & REKLAMO

Simpla abono	10.—	Fr. Sv.
Kun la membreco de UEA	12.50	Fr. Sv.
Unu numero	1.—	Fr. Sv.
Anonco (unu centimetra kolonero) ..	2.50	Fr. Sv.
Anonceto (1 linio: 10 vortoj)	0.75	Fr. Sv.
Korespondado (1 enskribo)	1.—	Fr. Sv.

ENHAVO

Printempa Konferenco en Frankfurt am Main, Edmond Privat (201).

El Naturo kaj Sciencoj: La estonto de l'karbo, D-ro Eugen Diesel (202). — Notoj. — En amara Horo, D-ro K. de Kalocsay (203).

Literaturo: Sinofera Leporo, tradukto de Edm. Privat (204). — Tra la libraro (204-206). — Novaj libroj (207). — Jarlibroj. — Cina Saĝeco (207).


Tra la mondo esperantista: 21-a Universala Kongreso de Esperanto (208). — La faka movado (208). — En kelkaj linioj... Svisa Esperanto-Societo. — Esperantista Vivo (209) Universala Esperanto-Asocio, Hans Jakob (210). — Oficiala Informilo de U.E.A. (211). — Novaj delegitoj (212). — Esperanto-Radio Programo (212). — Niaj mortintoj — Esperantista Parolejo — (213) Reklamo — Korespondado (213). — Petoj kaj proponoj (214) Reklamo.

Printempa Konferenco en Frankfurt am Main

Ni jam esprimis ofte jenan opinion: ke nenio pli disvatigas Esperanton ol uzado praktika, speciale se ĝi fariĝas ne en fermita rondo de jam ankorkitoj, sed antaŭ okuloj aŭ oreloj de ekstera publiko. Tial ni per ĉiuj fortoj klopodis okazigi konferencojn aŭ kongresojn, kie esperanto servu, ne kiel temo de belaj rezolucioj, sed kiel efektiva lingvo de interkompreniĝo por aliaj rondoj ol la nuraj esperantistoj.

en Frankfurt am Main laŭ invito de la tiea foiro, ja konata en la tuta mondo de l'komerco kaj trafiko kaj jam spertinta mem la utilecon de Esperanto por sia propra reklamo.

Ekzistas multaj plendoj kaj deziroj de la vojaĝantoj. Estos bone ke reprezentantoj de fervojaj kompanioj vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, ktp. ilin diskutu por proponi plifaciligajn en dogan- formalajoj, internaciaj biletoj, hortabeloj, ktp. Same



Post la sukcesa kunveno de instruistoj en Genève en 1921 okazis la du komercaj konferencoj en Venezia 1922 kaj en Parizo 1925, sed ili ankoraŭ ĉefe temis pri la disvastigo de nia lingvo en apartaj fakoj. La unua teknika konferenco en Esperanto, sed ne pri Esperanto, estis tiu pri radio en Genève 1924, poste la multe pli vasta pri Paco per Lernejo en Praha 1927. Lastan someron la interreligia kongreso pri paco en Hago kunigis eĉ 400 personojn diverslandajn.

Konstatante kiel sukcese funkcias nia lingvo parolata, la neesperantistaj kongresanoj konvinkiĝas sen ia ajn propaganda penado. Necesas daŭrigi tiun metodon kaj ĝin akceli en ĉiuj eblaj kampoj.

Je venonta Pasko 1929 estos la vico de interesatoj pri Turismo kaj Reklamo. Internacia konferenco pri tiuj temoj okazos

pri hotelistoj, turisma reklamo, gvidlibroj aŭ prospektoj. Estos utile ke Esperanto servu por helpi al klarigo, faciligo kaj normigo de multaj tiaj detaloj ofte grevegaj en vojaĝo.

Samtempe UEA havos okazon organizi ekspozicion de la jam granda materialo de turisma reklamo presita en Esperanto. En Venezia 1922 estis dediĉita iom da spaco kaj tempo al tio, sed en Frankfurt la okazo estos ankoraŭ pli favora.

En nia Decembra numero ni donos pliajn necesajn detalojn pri la konferenco, sed jam nun ni rekomendas al ĉiuj, ke ili interese fakulojn en sia urbo pri la afero kaj laŭeble decidu ankaŭ partopreni mem por helpi la sukceson de la afero.

Per Esperanto la vojaĝanta publiko havu sian internacian parlamenton en Frankfurt je Pasko 1929!

EDMOND PRIVAT.

EL NATURO KAJ SCIENCIOJ

La estonto de l'karbo

DE D-RO EUGEN DIESEL.

La uzado de oleo en la industrio kaj tekniko prezentas tiom da surprizigaj avantaĝoj, ke oni iom post iom transiros al plena enkonduko de tiu-ĉi hejtmaterialo. La motorŝipoj plimultiĝas je kosto de la vaporŝipoj, sed ankaŭ la hejtado de la vaporŝipoj per oleo anstataŭ karbo estas multe pli ekonomia, pli pura kaj pli oportuna. La transiro de la karbo al oleo prokrastiĝas nur tie, kie la karbo estas kompare pli malmulte-kosta.

Se la epoko de l'oleo atendigas ankoraŭ, hodiaŭ la teknikaj avantaĝoj de l'oleo estas nediskuteblaj. Sed la mondo devas konsideri nun baldaŭ pri ekmanco de petrolo, dume la karbminejoj ankoraŭ ne elĉerpiĝos.

Jam de kelka tempo oni produktas el la karbo per seka distilado likvan brulmaterialon. Pro diversaj kaŭzoj tiu-ĉi oleo-produktado estis de eta graveco. Intertempe oni sukcesis transigi ĉiuspecan karbon en likvan brulmaterialon laŭ la procedo de Bergius kaj Fischer, tiel ke reala sukceso ŝajnas certa. Jam estas komencitaj aŭ planitaj oleofabrikejoj laŭ tiu-ĉi metodo en Britujo kaj Germanujo. Laŭcela apliko de la procedo de Bergius estas la kombino de Oleo-fabrikejo kun gasfarejo. Anstataŭ gaso kaj koakso kiel ĝis nun, oni produktos gason kaj oleon.

Estas plej interese, prezenti al si la efikon de la karbolikviĝo. Ĉar ne plu minacus tumonda manko de la oleo, oni forlasus en ĉiuj uzinoj kaj fabrikejoj la bruligadon de ŝtonkarbo sur fajrokrado.

Oni produktos la varmodonantajn flamojn aŭ miksaĵojn per rigore serveblaj likvaĵ-ajutoj, en kaldronoj, motorcilindroj aŭ en gasigiloj. Ĉar la novaj vapormaŝinoj laboras sub forta alt-premo (tensio) kaj supervarmigo kaj montras altan gradon de perfekteco, fariĝos kiel senpera rezultato de la karbolikviĝo konkuro inter vapor- kaj eksplodmaŝino. Ambaŭ maŝinoj ja uzos la saman brulmaterialon. Kiel sekvo el tio estos atendebla pliaj progresoj en la konstruado de la du maŝinspecoj. Ĉe centra hejtigado kaj ĉe aliaj instalaj por varmigado oni same preferos la novan brulmaterialon kaj de nun reguligi hejt-ajutojn per la manradeto, anstataŭ ĵeti karbon en la fajrotuon.

La procedo de Bergius permesas ankaŭ la produktadon de gaso krom oleo. Estas stranga koincido, ke la gasigo de la karbo surloke de la minejo kaj la transigado malproksimen fariĝis tute nuntempa problemo sendepende de tiu de la likvigita karbo. Parte jam la teknika evoluo puŝis al tio. En Usono kaj en la Ruhrteritorio jam grandaj distancoj estas transpasitaj per la gaskondukiloj. Rezultis nature ekonomiaj avantaĝoj por la urboj kontrakte ligataj al la min-ja gaso. Parte temas pri necesegaj ekonomiaj bezonoj. La karbominejoj posedas kvantojn konsiderindajn de malfacile vendeblaj karbospecoj, de kies racia valorigo t.e. gasigo, dependos la rentebleco de la minejo. Sub la premo de tiu-ĉi cirkonstanco, la livero de gaso je distanco por Berlino el la Ruhr aŭ el Silezio venis en la centron de l'intereso. Ankaŭ en Britujo la problemo estas aktuala.

Pro tio ke ankaŭ evoluigos la unuopaj teknikaj kaj ekonomiaj faktoroj, ne estas dubeble ke enkondukiĝos la distanca transporto de preta gaso kaj oleo kaj retsimile traĵiros ĉiujn landojn.

La avantaĝoj estas tro grandaj. Transporto kaj uzado de la brulmaterialoj estas faciligotaj kaj malaltprezaj. Multaj

disigitaj unuopaj gasejoj kaj oleofabrikejoj estas kunigotaj en pli grandajn entreprenojn apud la produktoj de la karbo.

Estonte oni ne plu perdos energion per la primitiva transporto de ŝtonpecoj diversformaj kaj malŝparas lokon por deponi la karbon. Ne plu la karbo, deponita kiel ŝutamaso pleniĝos je akvo, kaŭzonta perdon de varmoforto kaj enuon en la karbokomercado. Oni ne plu transportos la nebruligeblajn residuojn de la karbo ĝis la loko de la bruligado kaj tie ilin igos skorio kaj cindro. La transporto de niaj brulmaterialoj ne plu efektiviĝos sur la vojo de minejo ĝis la ŝutmonteto, de fervoja vagono kaj ĉarveturilo al novaj ŝutmontetoj kaj deponoj. Nenia perdo plu kaj nenia malpurigado tiom konata ĉe transporto de karbo. La senfinaj karbotrajnoj malaperos. La konduko de energio kaj materio de la estonto estas la tubaro, konsistanta el kelkaj tuboj por diversaj oleoj kaj gasoj. Per la sama vojo povos funkcii la kabloj de la granddistanca elektra uzino. Ĉiu domo en urbo kaj kamparo havos sian kontakton por oleo kaj gaso. La aŭtomobilposedanto de l'estonto funkciigas sian motoron por peza oleo per la oleo kiun li prenas el la kontakto en sia domo kaj li pagas monate laŭ la monro de la kontrolilo.

La evoluo de tiu-ĉi gaso-kaj oleokondukoj aperas ekster ia dubo, ke ekzemple la Prusa Ministerio por komerco jam sin okupis pri la problemo de la kanalkonstruo, ĉar la karbo-transporto sur la akvo vojo ja certe malgrandiĝos.

Oni rajte povas supozi, laŭ la teknika kaj ekonomia evoluo, ke ankaŭ la elektro-farejoj stariĝos pli kaj pli apud la karbominejoj, metodo jam ekzistanta en la Ruhrteritorio kaj en la brunkarba regiono germana. Sed komplikiĝas tiam la demandoj pri la ekonomieco kaj laŭsleco pro la konkurenco de la oleo-kaj gaskonsumo, ĉar ambaŭ celas la saman kiel la elektro nome la produktadon de varmo kaj energio. Montriĝas plie ke kalkulo de la ciferoj valorantaj hodiaŭ, la instalado de elektro centraloj por granda distanco ne rekomendiĝas. La lumigado de la urboj estas pli avantaĝe farata de propraj elektrejoj anstataŭ de granddistanca centralo, escepte tie kie temas pri malmultekosta akvoforto. Malgraŭ tio oni povas antaŭdiri kun certeco, ke ekonomiaj kondiĉoj puŝos la elektro-centralojn al la Centroj de gaso, oleo kaj karbo kaj uzi la tubvojon por la kabloj. Ĉi-tio valoras en tiuj regionoj kiuj nur komencas stariĝi modernan energi-kaj varmomastromadon kaj kiuj povas deiri de la grandioza kuniĝo kiuj distingas estonte la produktojn de gaso kaj oleo.

Dume la malnovaj civilizitaj landoj transformos la produktadon de energio de la komenco, la landoj kun apenaŭ ekspluatitaj karbominejoj povas adaptiĝi al la nova metodo kaj ĉi-ŝokaze je multe malpli altaj kostoj. Estas malpli multekosta stariĝi produktojn de elektro, gaso kaj oleo proksime aŭ apud la karbominejo kaj fortransporti la energion per tubaro kaj kablaro. Ekzemple en Ĉinujo kie ampleksaj karboŝuoj atendas la ekspluaton.

Efektive la vizaĝo de la tero pli kaj pli similas je granda urbo. Ĉirkaŭ la globo kuŝas tubaroj kiel ili estas jam nun sub la trotuaro de la urboj. Sed samtempe okazos alia transformo: dume la aliformiĝo de la karbo en pli elasta formo fariĝas en la grandaj centraloj apud la minejoj, la agado de l'homo estos malcentrigata aliloke. Li ne plu estas ligata al la grandaj energicentroj kiel antaŭe. Ĉie en la lando troviĝas varmo, energio, oleo, gaso kaj al ĉiu loko ili venos en plej mallonga tempo. Kaj la novaj materioj estas sen fumo kaj sen fulgo.

La fabrika kvartalo ne plus tedos kaj naŭzos la homojn, kiuj loĝas proksime kaj la malnatura disigo de urbo en loĝa kaj industria partoj mildiĝos en certa grado.

La ŝanĝoj kiujn alportos la nova energia mastrumado en la ĉiutaga vivo estas konsiderindaj, Ekstos novaj kondiĉoj tutmondaj kaj socialpolitikaj. Monopoloj estas forigataj kaj komencos nova ludo de fortoj.

NOTOJ

Novaj nomoj en Ĉinujo. — Oni memoras bone kiam post la fino de la milito la renoviĝintaj ŝtatoj alinomigis urbojn aŭ redonis malnovan formon nacian. En Ruslando oni sisteme forigis la nomojn kiuj memorigis je historiaj okazintaĵoj aŭ personoj. En Norvegio oni ŝanĝis la nomojn de estinta Christiania kaj Fredrikshald en Oslo kaj Halden. En Persujo la nomo de la urbo Bender-Abbas transformiĝis en Bender-Pahlevi. La Ĉina Nacia Registaro decidis ŝanĝi la nomon de Pekino, de nun Peipino kaj la provinco Ĉilio nomiĝas nun Hopeio kio signifas ke ĝi lokiĝas en la mordo de la Flava Rivero (Ho-Pei-Ho).

Leviĝo de la mara fundo. — Kiel sekvo de la granda terremo japana 1923 okazis grandegaj ŝanĝoj de la mara grundo. La mezurado de la japana maristaro evidentigis ke la mara grundo ĉirkaŭ 700 kv.km. malaltiĝis. Apude oni konstatis sudokcidente de Jokohama, leviĝon je amplekso de 240 km. La plej profunda malleviĝo mezurita estas 720 m. kaj la plej alta leviĝo 318 m. Tio estas moviĝoj de la tera krusto je tia mezuro kiam oni ne konis ĝis nun aŭ eĉ konsideris ebla. Ne estas fiksebla ĉu tio fariĝis je unu bato aŭ ĉu ili dividiĝis je pli longa tempo. Ĉiokaze la kastastro instruas ke la ŝanĝiĝo de la terkrusto ne okazis tiom kontinua kaj sinsekva kiel nombro de geologoj opiniis ĝis nun. La tero bezonis longan tempon por kvietiĝi post la unua skuo. La nombro de la postaj skuoj je la unua tago estis en Tokio 213 je la dua 177 kaj je la tripla 105. La ondego kiu poste fluis super la marbordoj estis alta sep metrojn ĝi estis do malgranda kompare al la grandeco de la moviĝo. Ĉi tamen estis tiom forta por dronigi milojn da homoj kaj superakvigi grandajn terenojn.

Indiana renesanco. — Artikolo en la gazeto « Temps » enhavis interesajn detalojn pri la kresko de la renaskiĝa movado ĉe la indianoj en Suda kaj Centra Ameriko. La silenta agrara revolucio en Meksiko karakteriziĝis kiel repostulo de la grundo per la indiana elemento. Multaj hispanaj aŭ kreolaj grandbienuloj perdis posedaĵon sekve de perfortaj atakoj de indianaj kamparanoj sekvantaj malamom kelkcentjaran kontraŭ la « Gaŝupinoj » (Moknomo por hispanoj). Rimarkinde estas, ke la meksikano nuntempe konsideras kiel heroon de la sendependeco la lastan imperiestron Guatemoc, mortigita dum la konkera epoko. Lia monumento estis donacita de Brazilo al Meksiko en 1922 kiam la unua festis sian sendependiĝon centjaran de Portugalio. Alia signo de la evoluo de tiu-ĉi indianismo estas la plano diskutita en la respubliko San Salvador, ŝanĝi la nomon de la ŝtato. Anstataŭ la bonsona, latina kaj kristana nomo donita de la hispanoj, San Salvador nomiĝus Cuscatlan, kiel ĝin nomas la indiĝenaj indianoj. La ĉefurbo kiu ankaŭ nomiĝas San Salvador akceptus la nomon Atlacatl la nomo de la indiana estro kiu defendis la landon kontraŭ la konkerinto Alvarado kaj kiu mortis sur la brulŝtiparo.

En amara horo

DE DRO KOLOMANO DE KALOCSAY

Al la popolo esperantista.

*Nenio estas vi, nenio,
Se pri la senco sen ĥonscio
Vi blekas pri la nova sento.
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, fort' magia,
Dormema « rondo familia ».*

*Ĉu la ĝis ĥreva himnokanto,
Kolekta ĥoresponda vanto
Kaj ĥe pri gramatikĥreguloj
Disputas aro de stranguloj
Rajdante sur la Fundamento:
Jen estas do la « nova sento » ?*

*Ke rifuĝante de la devoj
Nur gapas vi ĥun strabaj revoj
Kaj alpreninte dignan pozon
Kelĥfoje jetas vi almozon
Sur la altaron de l' Afero —
Ĉu tio estas do ofero ?*

*Jes, ne laciĝos rond' sagaca
En sia « mallaboro paca ».
En junaj ĥoroj, el la flamo
De tiu fama « sankta amo »
La fajro por la amindumo,
Por la afero — restas fumo.*

*Mi batas, fraton batas frato
Lin mem turmentas ĉiu bato.
Ho gento, gento, verda gento,
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, gvida torĉo,
En sorĉ' malbona — bona sorĉo.*

*Kaj ĥvanĥam stranga sekto eta,
Sed fidi, luĥti, venĥi preta,
Por ĥiu, spite al la moĥo,
« Tra l'mond iranta forta voĥo »
Ne sangmalriĉa iluzio,
Sed estas ĥredo, religio.*

*Oferoj nutras la aspirojn,
Postulas ĉiu venĥ' — martirojn...
Ne ĥovru pale vian vangon,
Neniu volas vian sangon,
Nur donon, faron ĥaj fervoron
Kaj ĥoron, — sed la tutan ĥoron.*

*Sed ĉio vana! Mi ĥonscias,
Ke en dezerto mi elĥrias,
Vi restas plue en ĥvieto
Amuziĝanta societo.
Ho, ĥie estas la ĥonsolo
Por mi — poeto sen popolo ?*

Kun la nuna numero estas sendata la Bulteno de
la Internacia Labora Oficejo, n-ro 30.

L I T E R A T U R O

Sinofera Leporo

Rakonto de Buddha

Ĉar juna riĉulo el Benares decidis sekvi la Feliĉulon Buddha kaj vivi sankte, pluraj amikoj de la junulo, interalie Vimala, trovis lian decidon ridinda. Iris ili al parko por trovi la kunulon inter la disciploj de la Feliĉulo. Ĝuste Buddha estis instruanta tie, kiam ili alvenis.

« Iam lirakontis, asketo loĝadis mizere en montara groto. El arboŝeloj li sin vestis, nur akvon trinkadis kaj nur sovaĝajn berojn aŭ radikojn manĝadis. Sola kunulo al li estis leporo. Tiu besto scipovis paroli kiel homoj kaj ŝatis diskuti kun asketo. Ĝi profitis liajn instruojn kaj klopodis al saĝo.

Nun venis jaro de granda seko; jam ne fluis la montaj fontoj, jam ne portis florojn nek fruktojn la arboj. La saĝulo ne trovis plu kion manĝi aŭ trinki: al li jam naŭzis la solejo. Tagon li eĉ forjetis sian ŝelvestaĵon.

Lin demandis la leporo vidinte « Amiko, kion vi faras? — Vi ja vidas ĝin respondis asketo, mi ne volas plu surporti tiun veston. — Nu, rediris la leporo, ĉu vi forlasos la montaron? — Jes, mi iros tien, kie vivas homoj. Tie mi ricevos almozojn kaj mi povos manĝi. Ĉiuokaze la manĝaĵoj estos pli bonaj ol beroj kaj radikoj. »

Tiaj paroloj malĝojigis la leporon; ĝi ekŝajnis kvazaŭ infano forlasota de l'patro. Ekkiis ĝi: « Ne iru, amiko! Ne lasu min sola! Ĉu vi ne scias plie, ke perdiĝas animo per loĝado en urboj? Sole merita estas la vivado soleca en arbaro. »

Sed asketo restis neŝanceligebla; decidinte foriri, li foriros. Tiam diris la leporo: « Vi volas forlasi la montaron do forlasu! Tamen faru al mi la bonvolon atendi ankoraŭ unu tagon, nur unu. Hodiaŭ restu. Morgaŭ vi aĝos laŭplaĉe. »

Asketo pensis: « Leporoj estas lertaj por trovi nutraĵojn kaj eĉ ofte konservas rezervojn. Morgaŭ sendube ĝi alportos ian manĝaĵon. » Li do promesis ne foriri antaŭ la morgaŭo kaj la leporo foriris tute ĝoje.

Asketo estis unu el tiuj, kiuj respektegas Agni kaj tial li ĉiam zorgadis, ke fajro brulu daŭre en la groto. « Manke je manĝo, li pensis, mi tenos min ĉe varmo atendante la leporon. »

La morgaŭan matenon frue alvenis la leporo: nenion ĝi alportis. Bedaŭro montriĝis sur la vizaĝo de l'asketo. Sed jen lin salutis la leporo kaj diris: « Ni, bestoj, posedas nek saĝon, nek kleron: pardonu min, granda asketo, se mi iel kulpigis kontraŭ vi » kaj subite, per salto ĝi falis en la fajron: « Kion vi faras? ekkiis Asketo kaj alkuris al la fajro. Li eliris la leporon, kiu diris tiam: « Mi ne volas, ke vi rompu la devon, mi ne volas, ke vi forlasu vian rifuĝon. Estas ĉi tie nenio plu por vin nutri; do mi dediĉis mian korpon al fajro; prenu ĝin, amiko, manĝu mian karnon kaj restu en la montara solejo. »

Kortuŝinte, l'asketo respondis: « Mi ne iros al urboj kaj, eĉ se mi mortos pro malsato, mi restos ĉi tie ». La leporo estis tre feliĉa, ĝi rigardis al ĉielo kaj faris jenan preĝon:

« Indra, mi ĉiam vivadis amante sol:con; bonvolu min aŭdi kaj permesu ke falu pluvo. Indra aŭdis la preĝon de l'leporo kaj forta pluvo ekfalis. Baldaŭ ambaŭ amikoj trovis en montaro ĉiun bezonatan nutraĵon. »

Post mallonga silento, aldonis la Feliĉulo Buddha: « En tiu tempo, ho disciploj, la leporo estis mi, kaj la asketo estis unu el la junuloj ĵus enirintaj la parkon kun malbonaj intencoj.

Estis vi, ho Vimala! » Li stariĝis « Same kiel en la montara groto mi gardis vin de l'malbona vojo, ho Vimala nun foriĝin Buddha, mi montros al vi la sanktan vojon; viaj okuloj vidi viaj oreloj aŭdos kaj jen vi jam ruĝiĝas pro honto, ke vi prov forrabi de l'savo vian amikon plej karan. »

Vimala sin jetis al la piedoj de l'Feliĉulo. Li diris sian fide kaj estis akceptita inter la disciploj.

El Avadānaĉataka laŭ A.F. Herold, trad. Edm. Privat.

T R A L A L I B R A R O

Detala raporto pri iu publikajo okupus tro ampleksan lokon ĉe nia gazeto. La eldonaĵoj estas bibliografie notataj en la rubrik « Novaj libroj ». Sub titolo: « Tra la libraro » aperos ne plene sciencaj prilingvaj recenzoj, ĉar multaj aliaj gazetoj jam daŭn komisiis al lertaj kunlaborantoj tiun tre utilan laboron, sed per simplaj ĝeneralaj impresoj de nura leganto, celanta inform aliajn legantojn pri la enhavo de plej rimarkindaj novaperinta verkoj.

Literaturo. — Fajrverkoj. — Lernolibroj.

Preskaŭ samtempa apero de tri originalaj verkoj, el kiuj du verskolektoj, jen granda plezuro por literaturamanto.

S-ro Schwartz estas tiom lerta en prozo, kiom en verso: Ĉiu, kiun ridigis la komikaĵoj de l'« Verdkata Testamento » certe dezirus legi lian novan libron: *Prozo ridetanta*, kun per ol dudek tre ŝercaj rakontoj; (noveloj ili ne estas malgraŭ l' subtitolo). Se verkisto tiel utiligas nian lingvon, kaj eĉ ĝia specialan vortformadon, por bonhumoraj ŝercoj, tio pruvas kion muldebla estas Esperanto, kaj kiom ĝin plene majstras l'aŭtoro. Ĉu li akceptos tiun rimarketon? Se ni volonte aŭda pri kabareto nomata Odora Cimo, aŭ Gaja Pediko, se ĵurnal estas titolita Nostalgia Amaso, se la herooj estas Ŝmirmar Kilafan, epor, Kolbas, Pagagul, Lak Sigil, kaj la heroino Orlana, Meleagra, Vazelina, tio estas tre amuza; sed aliflanke nomojn, kiel Eskargo, Astiko, Dusabre, Ribouis, Lasoupe Goussedaŭl, k.a., povas ĝui nur franglingvano, kaj ties privilegio ne estas pravigebla. Kelkaj el la rakontoj jam aperis en niaj gazetoj; ilin oni ne povas resumi; ĉiu ŝercemulo hav mem la plezuron sperti, kiom da neatenditaj faktoj, situacioj, personoj, vortludoj, eĉ mokoĵoj al la esperantaj manioj, la spritverkinto elpensis. Lia stilo estas senriproĉa kaj per agrabl distraĵo la leganto samtempe ricevas lecionon pri modela esperanta prozo.

Ne malpli lerta, nek malpli sprita, estas S-ro Misu Berar en sia artfajraĵo *Spite la vivon!* Jen nova ĵonglisto de vortoj kaj rimoj, ĉu en originalaj poezioj, ĉu en parodioj, ĉu en l'moka poemo: *Tra la infero*. Ĉu vi mem estas poeto? Jes,

« Se vi povas
Viveme, laŭ interna voĉo,
petoli vikle ĉiel ĥoĥo,
aŭ talente kaj plensente,
ĥun akompano de ĥantil'
poeti pri l'
monat' april', -
vi ĥomprenas poezion,
vi estimas melodion. »

Kun la plezuro rimigi vortojn malofte kunigitajn estas priskribata la neekzisto:

« Ne ekzistas ran' ĥun vosto:
 Neĥ festen' ĥun tosto;
 Neĥ fiaĥro ĥun tri radoj.
 Aŭ ĥongres sen paroladoj.
 Neĥ man' sen ĥubuto,
 Aser' sen refuto.
 Sed ekzistas-ve! — ĉiĥanoj,
 Inter ni, samideanoj!
 Ne ekzistas arb' sen ŝelo,
 Neĥ sur poplo mirabelo;
 Neĥ vizaĝo sen mieno
 Aŭ vivado sen ĉagreno,
 Neĥ dolĉa olivo,
 Neĥ rekĥta deĥlivo.
 Sed ekzistas, (mi mem ĥredas)
 Fuŝversistoj ĥiuj tedas. »

Vortludemo akceptigos tiun fableton:

« Alaŭdino, paciencie,
 Aŭŝkultas fanfaronon
 De alaŭdo ŝin amanta;
 Sed ŝi ĥredas neĥ duonon
 El la vortoj fanfaronaj
 De nia vir-alaŭdo;
 Ĉar ŝi scias ja ĥe tio
 Nur estas vira... laŭdo. »

Ĉu ne plaĉas la ritmo de Balado, kies unua strofo estas:

« Sur alta roĥ'
 ĉe mara bord',
 dum la barbara mezepoĥ',
 staris el
 granito ĥaj cement',
 sur firma fundament',
 praĥstel'.
 Loĝadis ĝin
 nur princidin'. »

Jen « La vojo » de l'edzino:

« L'obstino, sciemo ĥaj malpacienco,
 Jen estas la... virtoj per ĥies potenco,
 Si loge ĥaj ĉarme, ĥun falsa sopiro,
 Atingis la ĥoron de l'viro. »

Kaj drameto en kelkaj vortoj:

« Mi iras vian domon...
 Mallumo. Lamp'! Esplor'!
 Ŝtelado! Rab'! Paĥaĵo
 ĥaj for! »

Sed anstataŭ eroj, la leganto deziras almenaŭ unu tutan poezion, eĉ mallongan. Jen ĝi.

Fanfaronoj.

Dum noĥto, en provinc' hispana,
 Renĥontis sin-fatal' ĉiĥana!
 Don Kihot' — sen piĥa lanc',
 Don Juan' — se nama ŝanc'...

Kaj iĝis ili, sen ŝĥrupuloj,
 Dumnoĥtaj, pro em', ĥunuloj...
 Don Kihoto — sen obstin',
 Don Juan — sen amatin'...

Ĉar ambaŭ sin eĥĥoni volis,
 Pri siaj vivoj priparolis:
 Don Kihoto — pri honor',
 Don Juan' pri amfervor'.
 Kaj ĥiel ĝentilec' postulis,
 Sin ili ŝanĝe tuj gratulis:
 Don Kihoto — per aplaŭd',
 Don Juan' — per moĥa laŭd'.
 Promenis sur la ter' hispana
 Ĉistage, tiu par' romana.
 Don Kihoto — sen duel',
 Don Juan' — sen ama cel'.

Lukse eldonita estas alia poezia verko *Amo ĥaj Poezio*, en kiu S-ro Jan van Schoor kolektis sian laboron de multaj jaroj. La enhavo bone respondas la titolon, kaj plenumas kion oni povas postuli de lerta versisto, de poeta inspiro. Pri la prozodio uzata, ĝi estas ĝenerale la komune akceptata ritma verso, sed, ĉe kelkaj lokoj, ĝi glitas al la laŭfranca silabnombra verso, kiu ŝajnas plimalbone akordiĝi kun la konsisto de nia lingvo. Prave la aŭtoro ne katenas sin per rigora rimado, sed ofte ellasas asonancojn. La pli granda parto de la poemetoj estas originalaj; nur kelkaj estas imitaĵoj de germanaj, flandraj, aŭ francaj versaĵoj. Se la aŭtoro ne atingis la majstrecon de kelkaj tre malmultaj unuarangaj niaj bardoj, li tamen lokas sin multe pli alte ol la svarmado de niaj poetoj. Liaj facilaj, plaĉaj, amaj kantetoj certe renkontos ŝaton. Pli ol vortoj diros du ekzemploj el du partoj de l' libro

En la fruĥtarbejo.

En la fruĥtarbejo ni ambaŭ desĥuis
 de l'arboj naturajn la pomojn;
 la fruĥtoj suĥplenaj ĥaj ruĝaj diŝutis
 ĉirĥaŭen dolĉegajn aromojn.

De tempo al tempo avide ni mordis
 ridante en saman la pomon:
 ni tute forgesis, ĥe ago simila
 faligis unuan la homon.

Subite ventegis, eĥĥpluvis ĥaj fulmis,
 la ŝtormo ĥolere eĥmuĝis,
 la pluvo falegis ĥvazaŭ per riveroj,
 Sub arbo ni ambaŭ rifuĝis.

La robon vi levis sur vian ĥapelon
 ĥaj ĝi je la pluvo nin tegis;
 sed tie ĉi anĥaŭ subite pluvego...
 de ĥisoj sonantaj pluvegis!

Vintro.

Morta ĥuŝas nun la ter'
 sub vual' argenta;
 griza estas la veter'
 ĥaj la ĥor sensenta.

Griza estas la ĉiel',
 for la ora suno;
 Ĉie la duonmalhel'
 pezas ĥvazaŭ puno
 Sur ebena la ĥampar'
 l'arboj staras nudaj;
 ter', ĉiel', aero, mar',
 ŝajnas ĉiuj mutaj.

Malvarmega la veter',
 ĉio sen ĥoloro;
 vintro regas sur la ter',
 regas en la ĥor'.

Kvankam ne originalaj, la tradukoj de pli ol cent hungaraj popol kaj laboristaj kantoj, kunigitaj en la libreto *Ni ĥantu*, ankaŭ havas literaturan valoron. Ili estas kantotaj laŭ la hungaraj melodioj troveblaj per la hungarlingvaj titoloj, aŭ komencvortoj. Tiujn ofte ĉarmaj poezietoj, kiujn ni ne povas kompari kun la originalaĵoj, superas la ĝis nun publikigitajn tiajn kolektojn laŭ lingva kaj poezia vidpunktoj. Por fremdulo, pej interesaj estas la popolkantoj, kiuj iel malkaŝas, ion el la popolanimo, kaj tamen, pro la simileco de l'temoj, ankaŭ montras parencecon de ŝajne tre apartaj ĝentoj. Jen kelkaj el tiuj kanttekstoj kiel ekzemplo.

<i>Flugu, fluojn, ĥoĥcinel',</i>	<i>Ĉar tiĥlema estas la</i>
<i>Amsendi' flugila,</i>	<i>Virinet' ĉe-ĥole,</i>
<i>Al la bel virinet',</i>	<i>Inter fingroj pli suben</i>
<i>Al la ĥol' blankĥbrila.</i>	<i>Glitu do petole.</i>
<i>Kaj parolu al ŝi pri</i>	<i>Poste flugu al, mi ĥaj</i>
<i>Mia senti' adora,</i>	<i>Flustru al orelo</i>
<i>Kisu ŝin anstataŭ mi</i>	<i>Kion vidis tie vi,</i>
<i>ĉe la ĥol' marmora.</i>	<i>Eta ĥoĥcinelo.</i>

Se mi povus, se mi povus al la reĝo eniri,
Al la reĝo, reĝa moŝto mian peton eldiri.
Do mi dirus al la reĝ' senbalbute:
Li ĥnabinojn, li ĥnabinojn ankaŭ varbu rekŭrute.
Sed la reĝo, sed la reĝo donis jam en la deĥreto:
Ne ĥonvenas soldatĉapo al la ĥnabina ĥapeto.
Sin ĥonvenas larĝaj juĝoj trideĥtri,
Kaj ĉe la ĵup: iu el infanteri'.

Batis deĥe, deĥunue, deĥdue...
 — *Blondulino ĥien tiel malfrue?*
 — *Kion ĥoncernas vin,*
Ĝardu bone pri l' nazfin',
Se vi ĥien ŝovas ĝin.
Rond-ĉapelon mi aĉetos,
Rosmarenon mi ĉemetos,
Bonodoros. stratoj,
Ĉie, ĥie mi irados.
Je mi belulinoj
Sopirados.

Domon faros mi ŝtonmure,
Amatin', ĥarulin', belulin'.
Kaj fenestrojn tricent sure,
Amatin', ĥarulin', belulin'.
Meze spegulĉambro estos
En ĥiu sin por mi vestos
Amatin', ĥarulin', belulin'.

Kuirejon mi rapidis,
Mi la pipon eĥbruligis.
Estus mi eĥbruliginta,
Se ne estus ĝi brulinta.

Mia pipo brulis bone,
Mi ne tial iris, ho ne.
Mi eniris, ĉar mi vidis,
Ke ĥnabino tie sidis.

La aminda fajron faris
Jam la fajro gaje ĥnaris.
Sed pli grandaj, brilaj bruloj
Estis ĉe ŝi, en oĥuloj.

Alrigardis ŝi serene,
Kaj ensorcis ŝi min plene.
Estingiĝis pip' brulanta
Kaj eĥbrulis ĥor' dormanta.

Kiuj ŝatas religian traktaĵon, kun multaj citaĵoj el la Biblio, utiligataj por iom mezepoka skolastika diskutado, kun atakoj al la ĉefaj eklezioj, tiuj trovos agrabla la broŝuron *Kie la mortinto?* Kiuj emas studon valoran, ĉu science, ĉu etike, ĉu literature, ĉu lingve, tiuj ne trovos veran kontenton dum ties legado.

En la broŝuro: *La Humanitaristaj Principoj ĥaj la Internacio de la Intelektuloj*, de rumana aŭtoro, ĉio dirata kaj proponata estas tre laŭdinda; ne nur laboristoj, sed kleruloj, kondukantoj kaj progresigantoj de l'homaro, devas intenacie unuiĝi, kunlabori kontraŭ la perarmilan batalon, la ŝovinistan naciismon, kuncentrigi siajn klopodojn por lukto la naturajn fortojn, celante al toleremo, al alta sensuperstiĉa kredaro, al nobla tuthomara moralo. Kiun, tiu estonteco altiras, tiu legu la verketon kaj aliĝu la movadon.

Gromada, nomo de Blankrusa Kampano-Laborista Unio, estas ankaŭ la titolo de esperantigita pledado por Okcidenta Blankrusujo, kaj plendado kontraŭ la Pola regado en tiu regiono. Malfacile estas por fremdulo ekscii ĉu tiuj akraj riproĉoj estas pravaj, sed el tiaj diversevenaj alvokoj, oni komprenas kiom la rajtoj de l'malplejmultaroj bezonas protekton, kiun grandan taskon havas la Ligo de Nacioj ĝis plena paciĝo en Eŭropo.

Dua kajero, aldono al la unua parto de lernolibro por Germanoj: *Esperanto durch Sprechen* de Prof. D-r Göhl aperis; la instruo bazas sin sur la legotekstoj de tiu unua parto sed alportas plian materion pri gramatiko kaj vortformado; ĝi estas do taŭga por dua, ripeta kurso, kiel aŭkaŭ por memlernado.

La *Deutsch-Esperanto Wörterbuch* de D-r Emil Pfeffer jam atingas duan eldonon; la malkareco kaj boneco de tiu praktika vortaro por komencantoj komprenigas tiun sukceson. Efektive, krom maloftaj terminoj, kiuj estas nuraj esperantigoj de germanaj radikoj, ĝi, ne konkurante pli ampleksajn verkojn, estas fidinda laborilo.

La *Supera Kurso* de D-ro Leopold Dreher estos bone akceptata; jam kelkaj tiaj lernolibroj aperis, sed nacilingve verkitaj. Estas tamen laŭcele de post unua nacilingva lernolibro, dua kurso estu internacia, tiel helpante unuecigi la instruadon. La legaĵoj de la dek lecionoj estas taŭge elektitaj, sufiĉe ampleksaj por anstataŭi legolibreton, kaj liveras la ekzemplojn por gramatikaj klarigoj; ekzerctaskoj ebligas laborigi senhelpe la lernantojn. Ĉefaj delikataj punktoj de nia lingvo estas vice ekzamenataj: atributo kaj predikato, si kaj sia, iĝi kaj iĝi, preciza uzo de certaj afiksoj aŭ prepozicioj; multaj rimarkoj aŭ atentigoj pravas spertecon de l'aŭtoro pri Esperanto kaj pri instruado. Ne ĉion klarigendan enhavas la libro, ĉar kurso ne povas daŭri tre longe, kaj kursolibro ne estas plena gramatiko. Studado de la *Supera Kurso* certe helpos plenposedi nian lingvon.

La Nova sistemo de Stenografio de S-ro F. de Kunovski, sama por ĉiuj lingvoj, estas prezentata per esperanto konkonduko, kaj unua parto por lingvoj: Germana, Angla, Franca, Hispana, Itala, pola Rusa. Du aliaj partoj montros la uzon por 14 aliaj lingvoj. Tiu *Internacionalstenografio* similas la sistemojn uzatajn en Germanujo, kaj pro la graveco de la problemo maritas seriozan atenton.

Novaj libroj

Prozo ridetanta. Noveloj originale verkita de RAYMOND SCHWARTZ. 1928.

Esperantista Centra Librejo, 51 Rue de Clichy, Paris. IX^e.

174 paĝoj, 12 ½ × 16 ½ cm. Prezo: 14.— fr. fr.

Spite la vivon! Mezgajaj poemoj originalaj kaj parodiaj de MISU BERARU. 1928.

Esperanto-Instituto Rumana. St. Gl. Grigorescu, 55-57, Cluj, România. 112 paĝoj, 12 × 16 ½ cm.

Prezo: 40 lei; eksterlande afr. 2.— sv. fr.

Amo kaj poezio. JAN VAN SCHOOR. 1928. Havebla ĉe la aŭtoro, Jan van Schoor, Julius de Geyterstraat, 149/1. Antwerpen. 96 paĝoj, 14 × 19 cm. Prezo: 2.— Belgioj.

Ni ĉantu! Kolekto de 108 hungaraj popol-kaj laboristaj kantoj. 1928.

Eldonis: Librovendejo de Hungaria Esperantista Societo Laborista, Budapeŝto. 62 paĝoj, 12 × 15 cm.

Prezo: broŝ. 1.10; bind. 1.80 pengo.

Kie estas la mortintoj? La respondo de la Biblio de J. F. Rutherford. Eldonis Internacia asocio de Biblio-studentoj.

Poŝtfako 15988, Baden, Svisujo. 62 paĝoj, 12 × 18 cm.

Prezo: 0,50 sv. fr.

La Humanitaristaj Principoj kaj la Internacio de la Intelektuloj. EUGEN RELGIS. 1928.

Belga Esperanto-Instituto, 11 Kleine Hondstraat, Antwerpen, Belgujo. 48 paĝoj, 14 × 21 cm.

Prezo: 0,50 sv. fr.

Gromada. Okcidenta Blankrusa Kampan-Laborista Unio «Gromada» Elblankrusigis DIM. SNEJKO. Minsk. 1928.

Havebla ĉe «S.A.T.», Colmstr. 1. Leipzig, 0,27.

32 paĝoj, 15 ½ × 23 cm. Prezo: 0,30 mark.

Esperanto durch Sprechen. Ergänzung zum I Teil: Tiefere Einführung in Sprachlehre und Wortbildung. Prof D-RO GÖHL.

Deutsch-Esperanto Bücherei N-o 13. Friedrich Ellersick, Berlin. 48 paĝoj, 12 ½ × 18 ½ cm. Prezo: 1.— mark.

Supera Kurso de Esperanto kun antaŭvorto de Prof. Th. Cart. D-RO LEOPOLD DREHER L.K. Krakow.

Eldono de la aŭtoro, Krakow, Starowiŝna strato 37, Pollando.

68 paĝoj, 12 × 16 cm. Prezo: 1.— sv. fr.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto enthaltend über 20.000 deutsche Stichwörter nebst 30.000 Esperanto Uebersetzungen. Von D-r Emil Pfeffer. Zweite Auflage, 6-10 Tausend.

Steyrer-mühl-Verlag, Wien. I, Wollzeile 20.

180 paĝoj, 12 × 19 cm. Prezo: 1,20 mark.

Internacionalstenografio en ĉiuj kulturlingvoj. Aldono por la Gvidilo en Esperanto. F. DE KUNOVSKI. Enkonduko kaj la parto (Germana, Angla, Franca, Hispana, Itala, Pola, Rusa).

Eldonis Instituto de internacionalstenografio, Duisburg, Friedenstr., 79, Germanujo.

4+16 paĝoj, 14 × 22 cm. Prezo: 1.— mark.

Du Kantoj. La Espero. La Tagiĝo.

Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 1.

4 paĝoj, 9 × 20 cm. Prezo: 10 eroj.

Oficiala Jarlibro de la Esperanto-movado. 1928. 16-a jaro. Universala Esperanto-Asocio, 12, Boulevard du Théâtre, Genève. 608 paĝoj, 12 × 16 cm.

Sennacieca Asocio Tutmonda. Jarlibro 1928. 7-a jaro.

S.A.T., Paris, Leipzig, Moskvo. 450 paĝoj, 12 × 16 cm.

Jarlibroj

Du jarlibroj por 1928, preskaŭ samformataj kaj samampleksaj estu menciataj antaŭ la fino de l'jaro. Ili estas liverataj al siaj anoj de niaj du plej fortaj internaciaj asocioj, UEA kaj S.A.T.

Komprenebla la ĉefa parto de la *UEA jarlibro* estas: post la listo de institucioj, fakaj organizoj, gazetoj, lando, kaj naciaj societoj, la nomaro de l'urboj kaj delegitoj. Por pli praktika uzo, ĉiuj informoj rilataj al iu loko, delegitaro, grupo, firmoj, hoteloj, sekvas ties nomon. Ĉar pli kaj pli turistaj bezonoj ekaperas, la koncernaj informoj plimultiĝis, kaj ekzemple la nombraj bildoj de urboj faras el la jarlibro geografian albumon vere foliumindan. En la ĝenerala parto, konciza historio de la homa civilizado estas lerte kaj science verkita; ankaŭ tre atentindaj estas du tabeloj: unu pri la diversaj religioj kaj sektoj, kun difino, kaj dua pri la unuaj paŝoj de nia movado en ĉiu regiono de la mondo. Kun pli ol 600 paĝoj, tiu jarlibro postulis grandegan laboron kaj estus dezirinde, ke ĉiuj ricevantoj ĝuste kaj juste taksu la valoron de informilo, kiu per si sole jam kompensas la kotonon pagitan.

En la *jarlibro de S.A.T.*, la ĝenerala parto ankaŭ estas malpli grava ol en la lastjaraj eldonoj; la informoj estas tiuj, kiujn membro povas postuli en praktika adreso de sia asocio. Kompense la listo de ĉiuj anoj, kun iliaj adresoj, troveblaj laŭ lokoj, laŭ landoj, laŭ sektoroj, (venonta jaro tiuj sektoroj estos anstataŭataj per la horzonoj, vere sennacieca nearbitra terdivido) fariĝis pli ampleksa, kio pruvas progresojn ĝojigajn de Esperanto en la laboristaj medioj. Novaĵo estas, ke post multaj adresoj, sistemo de literoj kaj ciferoj montras datojn de naskiĝo, de esperantiĝo, parolataj lingvoj, specialaj interesoj al scienco, arto, sporto, interŝanĝado, k.t.p.

G. S.

ĈINA SAĜECO

Tiu ĥiu povas paŝi sur la voston de tigro, sen ke tiu-ĉi ĥrias, havos sukceson en la vivo.

Estas senutile serĉi fiŝojn sur la ĥrono de arbo.

Plej fortan armeon oni povas senigi de ĝia ĝeneralo, sed ne plej mizeran homon je siaj pensoj.

Se oni do scias ĥio estas la vivo, ĥiel oni sciu ĥio estas la morto!

Homo sen sincereco similas al veturilo sen timono.

Saĝulo ĉiam timas, ke liaj vortoj superas siajn agojn.

Malfacile estas esti malriĉa sen envio. Estas pli facile esti riĉa sen fiereco.

Saĝulo parolas prudente sed agas rapide.

Ofendojn oni repagu per justeco, bonfaron per bonfaro.

Dum juneco evitu la sensualismon, ĥiel viro la ĥoleron kaj ĥiel maljunulo la avarecon.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

21^a Universala Kongreso de Esperanto

5a Somera Universitato

Budapest, 2-9 aŭgusto 1929

INFORMA BULTENO N-ro 1

Adreso por korespondadoj & telegramoj:

Esperanto-kongreso, Budapest.

La Loka Kongresa Komitato formiĝis kaj kore salutas la tutmondan esperantistaron. Mondkongreso de Esperanto en Mezeŭropo, inter plej diverslingvaj malgrandaj popoloj devas esti sukcesa kaj signifoplena por pruvi la ekzistrajton kaj util-lecon de Esperanto kaj krei novan fortan bazon de nia movado.

Konsisto de la L.K.K.

S-ro D-ro Samu Patai, Reĝa Registara Ĉefkonsilanto, Hon. Prezidanto.

S-ro Jozsef Mihalik, prof. en Instruistina seminario, Prezidanto.

S-ro D-ro Leono Lóránd, kuracisto, Vicprezidanto.

S-ro Istvan Nagy Molnár, Ministeria kalkul-ĉefkonsilanto, Vicprezidanto.

S-ro Paŭlo Balkanyi, bankoficisto, Sekretario.

S-ro Paŭlo Tolnai, komercisto, Sekretario. S-ino J. Benze, Protokolistino.

S-ro Elek Tolnai, komercisto, Kasisto.

S-ro Julio Baghy, aktoro-verkisto, S-ro Lajos Köhény, parlamenta konceptisto.

D-ro Gyula Lukás, reĝa financa konceptisto, D-ro József Szilágyi, bankoficisto.

D-ro József Takács, kuracisto, István de Zöldi, poŝtinspektoro; Referentoj.

Aliĝiloj. — Disdonotaj pere de la Esp., gazetaro, Naciaj Societoj kaj Delegitoj de UEA. La L.K.K. sendos al ĉiuj, kiuj petos ĝin.

Kotizo. — Por ĉiu kongresano senescepte, laŭ decido de ICK: 28 peng., 35 ŝil. aŭstr., 167 kĉ., 35 belgoj (175 frk. belg.), 125 franc. frk., 20 brit. ŝil., 21 germ. mk., 25 frk. sviz., 12.50 guld. nederl., 5 uson. dol., k.t.p.

Pagoj. — Per interpacia poŝtmandato, per bankĉeko, per monbiletoj en registrita letero al la sekretario S-ro Paŭlo Tolnai aŭ al la Kongresa Banko: « Pesti Magyar Kereskedelmi Bank. Budapest V., Tisza István u. 2. » kiu havas rilatojn en ĉiuj landoj. Indiku okaze de pago de banko al banko: *Por ĉonto Esperanto-Kongreso.* La banko korespondas en Esperanto.

Informpetoj al LKK. — La petantoj de informoj bonvolu aldoni necesan afrankon por la respondo, per respondkupono aŭ UEA respondkupono.

Donacoj. — La LKK volonte ricevos donacojn por helpi al la sukceso de la kongreso.

Blindula Kaso. La LKK akceptas mondonacojn por subteni partoprenon al la kongreso de blindaj samideanoj.

Koncertoj. — La LKK jam interrilatis kun la diversaj institucioj por ricevi rabatojn ĉe vizo kaj ĉe fervojo, ankaŭ sur ŝipoj de la Danubo. La klopodoj esperigas bonan sukceson.

Faĥaj ĥunsidoj. — Oni povas enregistri en la programon nur nepolitikajn fakkunvenojn. Proponojn oni sendu kun rimarko « Fakoj ».

Oficiala Organo. — Hungara Heroldo, Pongrás ut. 17. 71, Budapest X aperas dekfoje dum la jaro. La kongresanoj ricevis ĝin depost Januaro 1929. Prikongresaj informoj aperos en *Esperanto* kaj Heroldo de Esperanto, laŭeble en aliaj esp. gazetoj, kiuj petos ilin rekte de LKK.

LA FAKA MOVADO

Ni ricevas regule informojn pri E en la diversaj fakoj (komunikojn de fakaj societoj esp., kronikajoj, klopodoj intencataj k.t.p.) Por faciligi kontakton ni kunigas tiujn informojn sub la titolo « La Faka Movado ». Ni petas, ke tekstoj aperigotaj sub tiu-ĉi rubriko estu plej mallongaj, koncizaj kaj skribataj per maŝino.

Aŭtomobilistoj kaj motociklistoj

S-ro Karl Knoll, Theodor Körner Allee 11-1 Zittau, German., alvokas la esperantistajn aŭtomobilistojn, motociklistojn, memkondukantojn, ŝoforojn kaj aliajn personojn, kiuj iel rilatas al aŭto-aferoj, ke ili unuiĝu por progresigi Esperanton en la internacia aŭtomobilistaro. Pro la rapidege kreskanta internacia trafiko de motorveturiloj estas eble, ke post nelonge naciaj aŭtoklubo ekkonos la mondlingvan aferon kiel sian propran kaj helpos la ĝeneralan enkondukon de Esperanto. La franca « Touring Club » jam donis antaŭ kelkaj jaroj rezolucion por Esperanto. Sed kie restas la aliaj kluboj, kaj kie restas la agadoj post la rezolucio?

Ĉiuokaze mi petas miajn gamsportanojn, ke ili bonvolu sciigi min, ĉu mia propono trovis ilian aplaŭdon, kaj dankas jam antaŭe por eventualaj proponoj. Poste mi sendus rekte al ili novajn informojn.

Framasonoj

Necesas faka kunsido okaze de la proksima kongreso de Universala Framasona Ligo en Amsterdam, Sciigu Adreson kaj tiujn de aliaj interesigantaj fratoj al Hans Wolhson, Museumsplatz 16, Breslau, Germanio.

Kristanoj

Dum la 20a Kongreso de Esperanto en Antverpeno la Kristana Esp. Ligo Internacia (K.E.L.I.), kiu estas starigita sur evangelia kristanismo, decidis, denove komenci viglan agadon. Kiu povas helpi je la disvastigo de Esperanto inter la kristanaro, estas petata sendi proponojn, monhelpojn kaj aliĝon al la ligo. Jarkot, minimume 1 ŝilingo (angla). Oni adresu al S-ro Paul Hübner, Bergstrato la Quedlinburg (Germanujo) aŭ al S-ro C.A. Fairman 24, Binfield Road, Londono S.W.4.

Poŝtistoj

La Hungara Reĝa Poŝta Direkcio per ordono N-ro 9857/1928 X. 4. akceptis S-ron Stefan Zöldy, poŝtinspektoro,

kiel delegiton de la Internacia Ligo Esp. Poŝt-kaj Telegraf-Oficistaro (ILEPTO) en Hungarlando. Ĝi decidis oficiale rilati kun ILEPTO kaj invitis ĉirkulere la poŝtovicistaron en Budapeŝt lerni la lingvon. El tiuj kursanoj la Direkcio difinis la poŝtistojn deĵorontajn dum la XXIa kongreso.

Universitatanoj

Pro la fakto, ke dum la universale kongreso Faka kunveno ne trovas la atenton kiun ĝi meritas, la Franclanda Esperantista Univers. Federacio kun la Brusela Universitata grupo aranĝis kunvenon de universitatanoj en Bruselo. Senbrue anoncita ĝi ne havis multenombrian viziton. Ĉeestis 20 profesoroj kaj studentoj el ses landoj. Prezidis profesoro Pinty el Alger. Rezolucio pri kreo de naciaj univ. organizaĵoj akceptita.

En kelkaj linioj...

* Germanaj kreditoroj de la estinta Esperantista Ĉekbanko en Londono, kaj kies, bonhavo estis sekvestrita povas provi ricevecon tutan aŭ partan skribante al Reichsausgleichamt, Verlängerte Hedsmanstr. 2 Berlin S. W. 48.

* Komence de aŭgusto 1929, ĉiulandaj skoltaj kunvenos en ĵamboreo, t. e. en granda internacia kunveno, kiu okazos en Anglujo. Sed la rilatoj inter diversnaciaj skoltaj konsistas plejparte el afablaj ridetoj kaj delandaj rigardoj, ĉar, sen Esperanto, skoltaj estas mutuloj en ĵamboreo. Ni do devas propagandi Esperanto en la skoltaj trupoj.

De post 1918 ekzistas Skolta Esperantista Ligo (sekretario: Trupestro Norman Booth, en Netherton, Huddersfield, Anglujo), kies celo estas grupigi ĉiujn skoltojn scipovantajn la internacian lingvon. Eliras ankaŭ ĉiumonate gazeto ilustrita por skoltaj: « Skolta Heroldo » (adreso: 22, Cours Albert I^o, Paris-VIII). Sciigu tion al la skoltaj de via lando kaj instigu iliin lerni Esperanton, la nepre necesa lingvo por la tutmonda skotmovado.

* La cigarfabrikejo Emil Giger ĝen Gontenschwil, Svislando, Argovio, konata pro bonkvalita speco « Schweizerstumpen » envolvas pakajeton da dek kun surskribo « Habana Esperanto ». Al la svisaj samideanoj ni rekomendas postuli ilin en la tabakvendejoj.

* Multaj vojaĝoj ĉirkaŭ la tero jam estas faritaj, sed ĝis nun ankoraŭ ne tia, dum kiu nur Esperanto estis uzata kiel interkomprenigilo. Ĉi tiu manko nun estas forigata: S-ano Paŭl Posern en Doebeln (Germanujo) entreprenis tiun vojaĝon meze de Aŭgusto. Li vojaĝas bicikle tra Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrio, Hungarujo, Rumanujo, Sovet-Unio, Persujo, Hindujo ktp. S-ano et Lyon akompanas lin. Vizitante grupojn aŭ izolulojn, ili prezentos tre interesan kaj amuzan programon. La entreprenado estas riska. La ges-anoj en la tuta mondo estas petataj, subteni la entreprenon kiom ili povas. S-ano Posern estas membro de SAT numero 12008 kaj de UEA numero 30217.

* S-ro J. Bednar en Brno informas ke la Internacia Legolibro aperos certe dum januaro 1929. Monsendintoj kiuj ne deziras atendi ree povos ricevi la monon. Adreso: Dobrovského ul. 16, Brno, Ĉ. S. R.

* La Unuiĝo terglobŝtato pretendas la instruadon de Esperanto en la lernejoj ĉiuklasajn. Programon de la unuiĝo sendas senpage la sekretario: Luersen, Innocenciastrasse 25, Hamburg 37.

* Komercesta Esperanto Unio, Dresden/Radebeul, ĵus eldonis n-ro 7 de la « KEU-informilo », enhavanta ofertojn de diversaj varoj. KEU pli kaj pli fariĝas la kondukanta komer-

ca entrepreno en Esperantujo. En 9 monatoj de 1927 jam estas perataj per KEU varoj en valoro de 50.000.— Mark. Sekve de tiuj « praktikaj pruvoj » pli kaj pli la komercistoj emas, uzi Esperanton. Laŭ instigo de KEU jam 15 germanaj fabrikoj presis reklamon en Esperanto ! La filioj nun agas, atingi samajn sukcesojn en iliaj landoj. Ĉiu E. komercisto sin turnu nur al KEU.

Svisa Esperanto-Societo

Ekzamenoj, septembro 1928

Ekzamenkunsido de S.E.S. okazis en Bern la 22-an de septembro 1928. 14 kandidatoj prezentis sin, el kiuj 7 por la provoj al Atesto pri Lernado kaj 7 por tiuj de Supera Diplomo; ĉar unu el tiuj lastaj ne sukcesis, kaj ricevos nur la Ateston, estis disdonataj 8 Atestoj kaj 6 Diplomoj laŭ jena listo (alfabeta ordo):

Atesto pri Lernado,	1. S-ro Hermann BOOS en Saiguelégier.
» » »	2. S-ro Josef BROGLIN en Zollikofen.
» » »	3. F-ino Wally EPPER en St. Gallen.
» » »	4. F-ino Emeline JAYET en Morges.
» » »	5. F-ino Marguerite JAYET en Morges.
» » »	6. F-ino Yvonne JEANGUENIN en La Chaux-de-Fonds.
» » »	7. S-ro Tranquillo NONELLA en Bern.
» » »	8. S-ro Heinrich TANNER en St. Gallen.
Supera Diplomo,	1. S-ro Edouard BEZENCON en Bern.
» » »	2. F-ino Micheline JACCARD en Morges.
» » »	3. F-ino Berthe MONTANDON en Le Locle.
» » »	4. S-ro Maurice PERRENOUD en Le Locle.
» » »	5. S-ro Arnold VONLANTHEN en Bern.
» » »	6. S-ro Emil ZUBERBUHLER en Nesslau.

Ĉiuj anoj de la Ekzamena Komitato: S-ino SING, S-roj WENGER, SCHMID, HUMBERSET, KURSTEINER kaj STROELE kunlaboris. Ĉeestis ankaŭ la Prezidanto de S.E.S. S-ro STETTLER kaj du honoraj vizitantoj: S-ro Jos. NIGGLI, Urba Lernejdirekcia Sekretario kaj S-ro Walter ROSLI, Supera Oficisto de la Federala Fervoja Kontrolo.

G. STROELE,
Prezidanto de E.K.

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Al Ge-sroj Grot en Riga, fileto, Ilgonis.

Al Ge-sroj Rud. Dvoraĥ, en Piastow ap. Warszawa filineto Evelino Jadwiga.

Al Ge-sroj Luigi & Giuseppina Topi D de UEA en Casale Monferrato, Italio, filineto Marto.

Edziĝoj.

S-ro Antonin Odehnal VD de UEA en Slezska Ostrava kun F-ino Mana Valouškova.

S-ro Maurice Perrenoud, D de UEA en Le Locle Svis. kun F-ino Germaine Glauser.

S-ro Walther Barth, VD de UEA en Bautzen, German., kun F-ino Edith Strachan, ano de UEA en Montreal, Kanado.

S-ro Franz Heikenwälder, VD de UEA en Prostejov CSR, kun F-ino Manja Jemelka.

S-ro Adalberto Karpati, M. UEA, Arad (Rumanio) kun F-ino Elinjo Berohn.

D-ro Joachim G. Pola, Ano de UEA en Ceuta, Afriko, kun F-ino Matilde Vidal Forner.

Universala Esperanto-Asocio

Post la ventego. Nova agado. Trafiko kaj Turismo. Frankfurta Konferenco. Budapeŝta Kongreso. For la pesimismon.

« Trompo », « aŭtokrateco », « aŭgiasstalo », « krima solregemo », « raŭpoj en fromaĝo », kaj tuta kolekto de similaj esprimoj direktitaj al personoj, kiuj aŭ profesie aŭ libervole prenis sur sin taskon gvidi oficon al ili konfiditan. Esperantujo vidis unufoje tielnomatan « tagpolitikon » kutime plej aĉan laŭ esprimoj dum la elektoj. Komencis la tuta afero per ne laŭstatuta procedo de grava funkciulo de UEA, kiu anstataŭ uzi la sole eblan vojon, kredis plibone kuri en la straton por krii. Ni silentis. Nia konscio kaj nia konvinko ne postulis similan procedon. Sinceraj amikoj restis firmaj kaj samtempe komprenis je kio celis la agado de Sinjoro Delanoue. Efektive ĝi celis nenion alian ol forigo de la nuna UEA, starigo de ia hibrida organizaĵo kiu centrigas ĉion en unu « Esperanto-Movado » kun centro ĉe ĝenerale, anstataŭigon de la Naciaj Societoj, k.t.p. Tion li klarigis en Lyon dum la Franca Nacia Kongreso. Por atingi la unuan, t.e. senigi la movadon je UEA li atakis la elekton al la komitato. Tio ne sukcesis. La dokumentoj pri tio estas tro klaraj kaj tro unusencaj por daŭrigi en tiun direkton. Poste venis la « pezaj kanonoj ». Certaj aspektoj de nia negocado faciligis tion, kaj fine oni ja povas kritiki ĉie kie io estas farata. Tiun kritikon ni ripetis, rajtas ĉiu kaj ni aldonas, estas devo de ĉiu. Ĉiu rajtas informi kaj bedaŭrinde nur malmultaj uzas tiun rajton. Se presita raporto ne estas klara (nur tro ofte verkita meznokte sen tempo por ĝin legi de aliaj personoj) tiam oni demandu. Ciferoj tamen restas ciferoj kaj komparante oni komprenas nekularan esprimon en akompana teksto. La «-Enketa Komisiono» ekzamenis la aferojn, trovis ĉion en ordo, atentigis pri detaloj plibonigeblaj kaj plibonigindaj. Ĝi « blanklavis » la kulpigitojn. La Antverpena kongreso ovacie esprimis plenan fidon al la gvidantoj de UEA. S-ro Delanoue kaj manpleno da « kritikantoj pro principo » estis brile malpravigitaj. — La Komisiono de UEA respondecis S-ron Delanoue je la financaj sekvoj de lia agado kaj eksigis lin el siaj funkcioj.

El tiu-ĉi tuta afero ni ricevis diversajn instruojn utiligitajn por la estonto. Bedaŭrinde tiuj instruoj estas tro multekoste akiritaj. Tamen ni estas certaj ke iom post iom montriĝos la bono el ĉio. Unu el la riproĉoj direktitaj al la Centro estas tiu « pri aŭtokrateco ». Se respondecaj homoj ne respondas al niaj demandoj kaj malatentas urĝigon, dume ni devis decidi pri io ajn, ĉu tio estas « aŭtokrata » reĝimo? Movado kiel nia neniel povas sukcesi sub solregemo. Mankas ja la premisoj esencaj ekz. konkreta povo devigi aliajn ion plenumi, mensa simileco de la ordonota sekvantaro. Ne gazetartikoloj naskigas diktatoron, sed reala potenco kaj volo de plimulto akcepti tian regadon. Tial supraj rimarkoj estas sensencaj; sufiĉas ja kiel ni spertis, ke avertinte ŝuldanton pagi sian ŝuldon tiu laŭte kriis pri la « ĝenerala aŭtokrateco ».

La ventego pasis kaj la vero venkis. Ni devas pensi al rekonstruo, ĉar dolora estas la sekvo de tiu-ĉi perfida agado. Ni havis la certecon, ke ni finos en 1928 sen deficitado aŭ almenaŭ granda malaltigo de tiu-ĉi kaj plena kovro el flankaj gajnoj. La konfuzo kreita per la dissendo de miloj da cirkuleroj, plene da kalumnioj respuguliĝas en la eniro de la kotizoj. La morala perdo kaŭzita ja ne estas takebla sed la mona vidiĝos en la bilanco. Ni devos rekonstrui. Je tiu-ĉi celo ni antaŭvidas diversajn ŝanĝojn pri kiuj decidis kiel kutime la Administra Komisiono de UEA. Unu el la ŝanĝoj estas la presloko de la gazeto. Kiom da zorgoj kaj enuoj rezultis el tiu-ĉi laboro nur iu kiu ĝin faris povas kompreni. La loka disigo de redakcio kaj presejo ne multe rimarkiĝis dum la presado en Magdeburg kie la preseja personaro sciis la lingvon kaj laboris sub akom-

pano de vortaro. Aliflanke nia administrado estas tro rigida kaj rezultis sekve plendoj post plendoj. La malfrueco de la gazeto kiu fariĝis daŭra en la nuna jaro devas malaperi. Dua ŝanĝo koncernas la jarlibron kiu havos novan formon en 1929. Tria ŝanĝo estas pligo de la personaro en la Centra Oficejo, konstatita kiel nesufiĉa laŭ nombro. Eksteraj ŝanĝoj estas la starigo de pagocentro en Usono kie nia bonkonata S-ro Donald E. Parrish ree prenis sur sin oficon kiu jam sukcese plenumis antaŭ la milito. Intensigo de la individua prilaboro flanke de la ĉefdelegitoj devos plibonigi la situacion.

Ĉefe gravas la aliĝoj. Por 1929 ni povas konsenti eksterordinaran premion al ĉiuj frupagintoj kaj belajn premiojn al la varbintoj de novaj anoj. Uzu tiun okazon kaj helpu per tio al la stabiliĝo de nia Asocio. Pri ĉio ĉiu estas aparte informota per cirkulero. 1929 estas Trafika kaj Turisma jaro. Dum pasko okazos en Frankfurt am Main konferenco pri rehlamo en Trafiko kaj Turismo. UEA elmontrus ĉion kion oni faris en tiu-ĉi sfero. Post la uzado de la lingvo en turismo ni devos nun pensi videble enigi nian servadon. Ofte oni rimarkigas al ni, ke la uzantoj de Esperanto ja ne estas videblaj, ke reklamo inter la Esperantistoj estas senefika laŭ komerca vidpunkto k.t.p. Ni devos trovi vojon por videbliĝi nin. Esperantistoj vojaĝantaj vizitu nur hotelojn kiuj interesiĝas konkrete pri ni aŭ kiuj estas rekomendataj de la estonta « Hotela Servo ». Jam nun ni havas certan povon kaj lerta taktiko povus sukcesi nian aferon laŭ la formulo « Potenco per la nombro ».

Prava riproĉo farita al ni (kial al ni precipe ni ne povas kompreni) estas la manko de la kontakto inter la agantaj personoj, do inter la komitato, ĉefdelegitoj kaj la Centra Oficejo. Dum la ĉiujara kongreso devus okazi kunvenoj de tiuj aktivuloj kvankam ja la sperto montris ke Internacia Kongreso kun la variaj distraĵoj ne favoras tiajn laborkunvenojn. Ankaŭ alia fakto ekzistas: Veraj aktivuloj ne povas aŭ ne volas veni al kongreso. Por la Frankfurta konferenco estas dezirinde ke venu la homoj agantaj en la kampo de turismo kaj trafiko.

Budapeŝto, la reĝino de la Danubo, invitis la XXian kongreson okazontan dum aŭgusto 1929. Geografie tiu-ĉi urbo mirinde taŭgas nor nia manifestado ĉar ĝi estas ĉe la sojlo de tiuj landoj kie helpingo ludos rolon, kie la lingva diverseco montriĝas ĉiupaŝe. Moderna urbo kiu altiras ĉiujare milojn da fremduloj certe allogos la kongreseman esperantistaron kiu trovos kompenson en kongresaraĵoj de alta valoro. Ni nur memorigu je la artistoj hungaraj kiuj tiom lerte verkas kaj majstras nian lingvon. UEA intencas aranĝi plurajn karavanojn gvidotajn de la koncernaj ĉefdelegitoj. Estas funkciigota la Kongresa Servo kaj aparte speciala vojaĝo de Genève al Vieno kaj Budapeŝto. Ni serĉos ebligi malkaran partoprenon kaj informos pri tio en venonta numero de la gazeto.

Finante la jaron ni kutime rerigardas kaj faras moralan bilancon. Ĝi ne estas brila por 1928, la dudeka jaro de la ekzisto de nia Asocio. Ĉu la pesimismo ekregu pro fuŝa procedado kaj ŝajna revolucio de iuj kritikantoj? Ni pensas ke ne! La heredaĵon, kiun ni akceptis de niaj pioniroj kaj ĉefe de H. Hodler ni ne nur konservas kiel bonaj administrantoj en fajrocerta kesto, sed ankaŭ en nia konvinko, ke nur daŭrigo de nia vojo kondukos al sukceso. Ni lasu la blekadon al la daŭre malkontentaj homoj, kiel tiajn posedas ĉiu movado kaj eĉ devas posedi. Sed al ĉiuj kiuj agas senhezite kaj decide kun firma volo kaj konvinko ni diras « Daŭrigu » kaj al la hezitemuloj pesimismaj ni diras

« For la pesimismon ».

HANS JAKOB, *Direktoro de UEA.*



Universala Esperanto - Asocio

Centra Oficejo: 12 Bd. du Théâtre, Genève, Svis
Oficiala Informilo

Administra jaro 1929. N-ro 1. Novembro 1928

Nova jaro. — Pasis nun dudek jaroj ke fondiĝis nia Asocio. Minacis ĝin detruo kaŭzita ne de eksteraj malhelpoj sed de internaj disputoj. Ankaŭ tio pasis. Ni devas pensi je la rekons-truo ĉar multé influis tiu-ĉi subfosa agado nian regulan laboron. Ni devas regajni la perdon kaj sur nova fundamento de fido refortigi nombre la Asocion. Ni kalkulas je ĉies helpo kaj bon-volo kaj dankas sincere al ĉiuj kiuj restis firmaj dum la kriza momento. Nova laboro nin atendas kaj ni petas vian bonvolan atenton pri ĉio kio sekvas.

Fino de la Administra jaro 1928. — Ni atentigas niajn delegitojn ke el la 9100 anoj de la jaro 1927 ne repagis la kotizon por 1928 pli al 2000 personoj. Dum oktobro ni dis-sendis admonilon al ĉiuj en landoj sen teritoria organizo kaj sen la ebleco enkasigi per la poŝto. Al la Ĉefdelegitoj ni sendis liston kun la nomoj por provi regajnon de tiuj nerepagintoj. Ni insiste petas vin klopodi en tiu senco. — Pri la finciferaro kaj la bilanco informas vin la venonta numero kiu ankaŭ enhavos detalojn pri la budĝeto por 1928 kiun ni nun ellaboras kaj submetas al la Administra Komisiono de UEA kiu laŭstatute ekzamenas kaj aprobas ĝin.

Jarlibro 1929. — Dum novembro ni dissendas al ĉiuj Dele-gitoj kaj Vicdelegitoj la Oficialan Bultenon no. 23 kun la kuti-maj aldonoj. Jam nun ni petas vin nepre atenti ke ĉiuj informoj por la jarlibro devas atingi la Centran Oficejon je la 31 de-cembro 1928. Kompreneble oni ne atendu ĝis la dirita dato kiam ŝanĝoj ne plus okazos. La informojn por la Adresaro ni petas komuniki per la kolora folio dissendota kun la Oficiala Bulteno no. 23.

La varbado de anoncoj povas komenci jam nun. La prezoj restas la samaj kiel por la jaro 1928 kaj pro ŝparo ni ne re-presas la tabelon de la prezoj.

Tekstoj por anoncoj kaj reklamoj atingu nin baldaŭ. Ni ne fiksas findaton ĉar laŭbezone ni povas ĉiam aldoni reklamojn, ĉar enŝoveblaj en la kompostajon.

Ni tie-ĉi sincere dankas al la Delegitoj speciale klopodintaj por la reklamvarbado. Tio estas S-ro Bonini en Venezia, S-ro Johannes en Düsseldorf, S-ro Krieger en Stettin, S-ro Istel en Wiesbaden, S-ro Rodeyns en Tirmont, S-ro Schoofs en Antwerpen. La koncerna loko en la jarlibro 1928 montras la klopodadon de tiuj samideanoj plej trafe kaj ni ĝojus se aro da pliaj aktivuloj imitus tiun diligentecon.

Kotizoj 1929. — Ili restas samaj kiel en 1928. Kiel por 1928 ni konsentas por 1929 premion al ĉiuj kiuj pagas la kotizon ĝis 31 decembro 1929. Tio signifas, ke ĉiu kiu plene pagis la kotizon. Partpagantoj ne rajtas tiun favoron. La premio konsistas el unu volumo de la fama biblioteko INTERNACIA MONDLITERATURO eldonita de la firmo Hirt & Sohn en Leipzig. Elektro libera laŭ listo.

Por subtenantoj ni povas sendi belajn premiojn kaj ni espe-ras ke pli granda nombro da personoj aliĝos kiel Subtenantoj.

La aranĝon de premiado por varbado ni daŭrigas. Pri ĉiuj premioj vidu la liston en la speciala informilo sendata al ĉiuj anoj de la Asocio komence de novembro.

Franca Teritorio. — Pro la eksigo de S-ro Delanoue la pagocentro ne plu ekzistas. Ni informis nian Francan Mem-braron ke provizore pagoj estu farotaj al nia poŝtĉeko en

Lyon, compte des chèques postaux 221.26

Universala Esperanto-Asocio. Genève.

Ni klopodas reorganizi pagocentron sur nova bazo kaj en taŭga momento informas pri tio. Ni komisiis nian Komercan Delegiton en Lyon, S-ron Lévin enkasigi la kotizojn por 1928 de la francaj membroj ankoraŭ ne pagintaj al ni. Eblaj pagoj dufoje faritaj estas transportotaj aŭtomate por la nova jaro. Pri iaj eraroj ni petas pardonon kaj atendas informon por rebonigi.

Garantia Kapitalo. — Plezure ni povas sciigi pri aliĝo de nova Dumviva Membro dum la Antverpena kongreso

Dua serio. Frk. sviss.

Antaŭa listo : 7.800.—

27. F-ino Julia Culver, Genève 300.—

Sumo Frk. 8.100.—

Ni memorigas, ke atesto al la Garantia Kapitalo de UEA kostas tricent Frankojn svisajn, pageblajn en tri partoj dum daŭro de tri jaroj. La atesto de Garantia Kapitalo de UEA rajtigas je dumviva membreco al la Asocio, dumviva ricevo de la gazeto Esperanto kaj de la jarlibro kiel ankaŭ de eblaj aliaj oficialaj eldonaĵoj de la Asocio.

Pagocentro en Usono. — Nia komitatano usona, Sinjoro Donald E. Parrish deklaris sin preta denove agi por nia Asocio kiel enlanda sekretario. Ni submetis tiun proponon al la komisiono de UEA kiu akceptis kun danko al la proponinto. Jam antaŭ la milito Sinjoro Parrish plenumis tiun taskon por UEA kaj ni tre ĝojas ke ni ree havas lian helpon. La dele-gitoj de UEA en Usono akceptis la proponon. Post plenumo de la formalaj kondiĉoj aperos kompleta sciigo pri tio. De nun ĉiuj kotizoj en Usono estu pagotaj al Sinjoro Parrish kiu havas la jenan adreson:

National Secretary, Universal Esperanto Association, 109 Fordham Drive, Buffalo N. Y.

Imitinda ekzemplo. — Fervora ano ĉeĥoslovaka de UEA kiu deziras ke lia nomo ne estu konigata, donacis la sumon de mil kronoj ĉsl., al la Teritoria kaso por pagi la kotizojn de dudek malriĉaj delegitoj en ĈSR nepovantaj pagi ĝin. Ni kore dankas al la simpatia donacinto kaj rekomendas tiun aĝon kiel imitindan ekzemplon.

Centra Oficejo de UEA. — La personaro de la C. O. konsistas el :

Hans Jakob-Notz, Direktoro

F-ino Josephine Damon-Pichat, Sekretariino.

F-ino Rosa Kocherhans (Korespondado, Delegitoj)

F-ino Mary Lotte Kapfer (Membrokontrolado)

S-ro André Schild (Ekspedo, klasigado)

F-ino E. Damon Pichat (helplaboroj).

Krom tio laboras ĉe la Centra Oficejo pri la biblioteko de UEA kaj redakciaj aferoj Sinjoro Petro Stojan, L.K.

Berlina kunveno. — La nunjara kunveno de la Berlina Teritorio okazos la 27an de novembro 1928 en la restoracio « Zum alten Askanier » Anhalterstrasse 11, je la 20a horo. Ĉiuj anoj de UEA ankaŭ estintaj estas kore petataj: Venu certe kaj akurate, Max Blankenheim, ĉefdelegito.

Novaj Delegitoj

Amiens (Franclando, Somme). D.: S-ro Léon Moitié, rue de Dijon, 26.

Asch (C. S. R. Bohemio). D.: S-ro Rudolf Hollerung, Bürgerheimstr. 1815.

Batu Pahat (Brit. Indio). D.: S-ro K. S. Bessyo, Bukit Batu Rabber Estate.

Binghampton (Usono N. Y.). D.: S-ro Willy Sieler, 48 Schubert street.

Esperanto - Radio Programo

de la Komisiono por Radio-Statistiko, Komisiita de I.C.K. Kunmetita de J. Jungfer, Lindenstrasse 10, Lübben N-L, Germ.

DIMANCO

- 07.00. — *Moskva*, 1450 m. — Esp.-Kurso aŭ stiigoj kaj novaĵoj, 60 min.
08.35. — *Langenberg*, 468,8 m. — Köln, Aachen, Münster — 25 min. Esp.-Kurso. — Par.: S-ro A. Dormanns.

LUNDO

- 17.30. — *Kiev*, 775 m. — 30 min.
19.30. — *Madrid*, 375 m. — Par.: Pastro Mariano Mojado. Esp.-Kurso. — 30 min.
22.15. — *Moskva*, 1450 m. — Precizaj informoj mankas.

MARĜO

- 19.15. — *Minsk*, 900 m. — Par.: K-do Dim. Snejko. — 30 min. Paroladoj pri diversaj temoj el BSSR.
19.30. — *Praha*, 348,9 m. — Kurso. — 10 min.

JAŬDO

- 19.30. — *Madrid*, 375 m. — Par.: Pastro Mariano Mojado. Esp.-Kurso. — 30 min.
20.00. — *Paris P.T.T.* 458 m. — Par.: D-ro Corret kaj Prof. Cart Esp.-Kurso, elementa kaj perfektiga. — 30 min.

VENĎREDO

- 18.45. — *Praha*, 348,8 m. — Esp.-Kurso. — 10 min.
19.00. — *Königsberg*, 303 m. — Danzig, 272,7 m. — Par.: S-ro Smollenski. Esp.-legado. — 30 min. — Eble horduonon pli malfrue.
19.15. — *Frankfurt*, 428,6 m. — Kassel. — Par.: S-ro Wischhoff. — 30 min. Esp.-Kurso. — tago kaj horo ofte ŝanĝas.
19.45. — *Stuttgart*, 379,7 m. — Freiburg, 577 m. — 10 min. Programo de la venonta semajno. — Par.: D-ro Vogt.
20.05. — *Zürich*, 588 m. — 10 min. — Parolado pri diversaj temoj.

SABATO

- 18.15. — *Breslau*, 322,6 m. — Gleiwitz, 329,7 m. — 10 min. Parolado pri sileziaj kaj literaturaj temoj.
18.55. — *Königsberg*, 303 m. — Danzig, 272,7 m. — 5-10 min. Programo de la venonta semajno. — Par.: f-iro Wermke.
22.15. — *Bruselo*, 508,5 m. — Par.: S-ro Kempeneers, — 5 min. Programo de la venonta semajno kaj diversaj aliaj sciigoj.
22.15. — *Moskva*, 1450 m. — Programo de la venonta semajno. — 30 min.
— — *Madrid*, 375 m. — Par.: Pastro Mariano Mojado. Programo de la venonta semajno.

ĈIUTAGE

- 11.45. — *Leipzig*, 365,8 m. — Dresden, 275,2 m. — Par.: S-ro Vogel. Vetero en Esperanto. — 5 min.
21.30. — *Sevilla*, 446,8 m. — La 1-an kaj 15-an de ĉiu monato. Propagando kaj informoj pri Esp. en hispana lingvo.
— — *Berlin*, 484 m. — Stettin. — Par.: S-ro Glück. — 30 min. Esp.-parolado pomonate, plej ofte jaŭde 19.00-19.30.
— — *Tallinn-Reval*, 408 m. — Esp.-parolado senregule.
— — *Bratislava-Pressburg*, 300 m. — Esp.-parolado senregule. La tempo estas tiu de Meza Eŭropo.

- Bockfliess* (Aŭstrio). D.: S-ro Franz Brückl, instruisto, No. 104.
Creil (Franc. Oise). D.: F-ino Marg. Boissard, « Les Terrasses », 8, rue Ch.-Aug. Duguet.
Dědov (C. S. R.). D.: S-ro Bohumir Podzimek, Zofino údolí 116.
Fryštát (C. S. R.). D.: S-ro August Majer, No. 386.
Jackson (Usono, Michigan). D.: S-ro Erich Kawelitzke, 206 Second-Str. c/o Mr. L. S. Haynes.
Jackson (Usono, Michigan). D.: S-ro Erich Kawelitzka, 206 Se-Box 324.
Kaju Tanam (Nederl. Indie, Sumatra). D.: Radja Mangkoeto S. M. Samsudin Rassat, Kaju Tanam by Padang.
Klagenfurt (Aŭstrio). VD.: S-ino Bertha Knittl, Wulfengasse 15.
Knutwil (Bad) (Svis. Lucerne). D.: S-ro Fr. Michel, Bahnstation Büron.
Ludvika (Sved. Darlekarlio). D.: S-ro Edvard Lundin, Box 429.
Myslkov (C. S. R. Bohemio). D.: S-ro Fr. Jankovsky, M. p. Sedlec na Dr. W.
Nechanice (C. S. R. Bohemio). D.: S-ro Jan Dvoráček, libroven- disto.
Orlová (C. S. R. Silezio). D.: S-ro Josef Dubny, mineja oficisto, No. 299.
V.D.: S-ro Antonín Slanina, tajloro, No. 402.
Petrvald (C. S. R. Silezio). D.: S-ro Fr. Kretínský, No. 83.
Rhodes (Atalujo, Insulo Rodezo). D.: D-ro Mercado Hasson, ku- racisto.
Ribeira Grande (Insulo St. Miguel, Acoroj). D.: S-ro Fred. Aug. Serpa, inĝ.
St. Margrethen (Svisl. St. Gallen). D.: F-ino Anna Bayer, instru- istino.
Tetuan (Hisp. Maroko). D.: S-ro Roberto Maraury, Inspector de Aduanas.

La supraj elektoj fariĝos valoraj se ĝis 30 tagoj post la unua publiĝigo neniu membro protestas pro gravaj kaŭzoj. Intertempe la novaj D. kaj VD, agas provizore.

*
**

Ŝanĝoj

- Bisamberg* (Aŭstrio). D.: S-ro Raimund Peter, No. 151.
Česka Skalice (C.S.R. Bohemio). D.: S-ro Odon Horák, No. 250.
Kediri (Ned. Indio, Java). D.: F-ino Th. Liem Nio, Sembodjan.
Leichworth (Brit. Hertfordsh.) D.: F-ino Frances Bartholomew, Wilbury Rd. 154.
Liverpool (Brit. Lancash.) D.: F-ino J.-D. Applebaum, « Penta- valon » Menlove Avenue, Wawertree.
Lomza (Pollando, Bialystok.) D.: S-ro Mojzesz Perelman, Długa 7.
Roubáir (Francl. Nord.) D.: F-ino Germaine Delerue, 305 Grande Rue.
Rumburg (C.S.R. Bohemio.) D.: S-ro Franz Wagner, Lange- gasse 26. VD.: S-ro Jan Zemek, Hrnčířská 36.
Sibiu (Rum. Trans.) D.: S-ro Aleksandro Kusnyir, Rozmaring 14.

En la jenaj lokoj ne plu estas delegitoj:

- Amstelveen*, Nederl.; *Bennisch*, C.S.R.; *Bobowa*, Pollando; *Borohrádek*, C.S.R.; *Cali*, Kolombio; *Chelsea*, Usono; *Chor- zów*, Pollando; *Coventry*, Britlando; *Drognens*, Svisl.; *Hanoi*, Indochine; *Herford*, Germ.; *Hodonin*, C.S.R.; *Horní Suchá*, C.S.R.; *Ivanovice na Hané*, C.S.R.; *Klundert*, Nederl.; *Lauscha*, Germ.; *Märisch Chrostau*, C.S.R.; *Marienwerder*, Germ.; *Mars- chendorf I*, C.S.R.; *New Malden*, Brit.; *Nikolsburg*, C.S.R.; *Nogent s/Oise*, Francl.; *Nové Mesto*, C.S.R.; *Parkaň*, C.S.R.; *Perth*, Britlando; *Pohorelska Maša*, C.S.R.; *Polička*, C.S.R.; *Radziejów*, Pollando; *Rakovnik*, C.S.R.; *Rochester*, Usono; *Sandberg*, Germanio; *Schaffhausen*, Svislando, *Secwen*, Svis- lando; *Sölde*, Germanio; *Solnice*, C.S.R.; *Suché Vrbné*, C.S.R.; *Szögyén*, C.S.R.; *San Fernando*, Ĉilio; *St. Julien*, Franclando; *Tremošno*, C.S.R.; *Vysotké Myto*, C.S.R.; *Vysokov*, C.S.R.; *Zásmuky*, C.S.R.

Genève, 25 Oktobro 1928. Hans JAKOB, Direktoro de UEA.

Niaj Mortintoj

Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

S-RO JOSEF AUMAYR, faka instruisto, 75 jaraĝa, D de UEA en Linz, Aŭstrio de 1913 ĝis 1914.

S-RO J. M. DE VILLA, Vicdelegito de UEA en Habana, Kubo post longa sufero, 23 Julio 1928.

S-RO G. H. BACKMANN, sveda pioniro de nia movado en Ramlösa (antaŭe loĝinta en Helsingborg).

S-RO WILHELM VELTEN, rektoro, 78 jara en Laubegast (Germ.). Verkinto de gramatiko kaj frazaro, eminenta steno-grafo kaj aŭtoro de propra sistemo.

S-RO WILLIAM HAYNES, MA de UEA en Reading, Britujo.

S-RO JAKOB HECHTL, fervoja inspektoro, 56 jara en München, 30.8.28. Organizinto de la Kvara Aŭstria Esp. Kongreso en Franzensbad kaj iniciatinto de la unua monumento honore al nia majstro, starigita en sama loko 1914. Dumviva ano de UEA.

D-RO BEDRICH MOLNAR, evangelia supera eklezia konsilanto, membro de UEA en Praha, patro de s-roj Inĝ. Bedrich kaj Jan Molnar ambaŭ UEA — anoj kaj aktivaj esperantistoj.

S-INO SUGHY ROSA, patrino de nia Delegito S-ro Paolo Bossi en Abbiategrasso, Ital.

S-RO R. H. MOODY, DM n-ro 87 en Bicester, Anglujo.

S-RO ALEX. PAROFF, bulgara ano de UEA en Leysin, Svislando.

S-RO EDWARD SWICIMSKI, Ano de UEA 29462 en Warszawa, 5/8/28.

Sinceran ĥunsenton!

Esperantista Parolejo

Oni laŭdas :

* S-ro *W. Bartel*, ano de UEA en Duisburg, treege dankas al la Londonaj samideanoj J. Gloser & Willcocks Wadham, Coventry pro helpo dum vojaĝo.

* S-ro *Leon Agourtine*, Ano de UEA en Paris dankas al jenaj delegitoj pro rapide plenumita grava servo faka: S-ro Kraus en Praha, S-ro Balkanyi en Budapest kaj D-ro Sós en Vieno.

* S-ro *Willy Schulze*, Ano 31781 en Gifhorn, German., kore dankas al la D de UEA en Tilburg S-ro E. Vossen kaj al D de UEA en Goch S-ro Haberler pro afabla akcepto kaj helpo dum vojaĝo.

* S-ro *Gahler*, delegito de UEA en Reinowitz, Ĉeĥoslovakio, dankas kore al sinjoro instruisto Markau, UEA-ano en Postdam por la afablega gvidado tra Potsdam kaj Sanssouci.

* S-ro *Serafim Vitanov*, Ano de UEA en Dupnico, Bulg., kore dankas al jenaj samideanoj kiuj lin helpis dum lia vojaĝo: S-ro P. Balkanyi, D de UEA en Budapest, S-ro Rajmund Čech en Vieno, F-ino Geers en Antverpeno, S-ro Nišimura en Paris, S-ro Rud. Unger en Zürich.

* S-ro *Ivan H. Krestanoff*, DM de UEA esprimas plej korajn dankojn al S-ro Bonini, D en Venezia, Luigi La Pila, VD en Milano, Ge-sroj Sergeant kaj S-ro Barthélémy en Boulogne-sur-Mer, S-ro Georges Perrin, D en Calais pro iliaj afablaj servoj dum vojaĝo.

* S-ro *Ed. Niķelsons* en Riga sincere dankas al estonaj samideanoj kiuj lin afable akceptis helpis kaj gvidis dum bickla vojaĝo.

* S-ro *Vlado Juĥl*, profesoro de komerca akademio en Bratislava, gvidinta porkongresan studentan ekskurson sincere dankas kaj salutas jenajn delegitojn kaj gesamideanojn:

Starke (Nürnberg), Hoeber, ge-Eschler (Mannheim), Funken (Koblenz), Wilbert (Köln), Jung (Horrem), Brihay, Schweingruber (Bruxelles), Boeren, Schoofs (Antverpeno), Mast, Petiau (Gent), Bénéoit (Oost-Duinkerke), Deligny (St. Omer), Barthélémy, Duchochois (Boulogne), Gasse, Meunier, Noel (Le Havre), Gérard, Ferkö, Delanoue (Paris), kaj Bouvier, Damon, Borsa, Kocherhans, Elmiger (Genevo).

REKLAMO

MALLONGIGOJ: L = *letero*. PK = *poŝtkarto*. PI = *poŝtkartoj ilustritaj*. PM = *poŝtmarkoj*. bfl = *poŝtmarkoj sur bildflanko*. kĉl = *kun ĉiuj landoj*. Esp-ajo = *Esperantaĵo*. fot-ajo = *fotografajo*. gaz. = *gazeto*.

Atentigo!

La personoj anoncantaj havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al la ricevitaĵoj petoj, klarigante ĉu ili deziras aŭ ne deziras daŭrigi la korespondadon. Kiu ne respondas peton konforman al sia anonco, tiu malutilas al la internacia korespondado per Esperanto. Ni atentigas plie, ke la redakcio ne respondecas pri la tekstado.

Korespondado

Interŝanĝo de objektoj

Auxerre (France, Yonne) S-ro Dupuy, 5 rue Egalité,, monerojn, PM. Ciam resp.

Babice u Uher. Hradište (Ĉeĥoslov.) S-ro Precechtel, instruisto L, PK, PI kĉl.

Bačka-Palanka (Jugoslav.) F-ino Hilda J. A. Schreiber, L nur pri ŝercaĵoj temoj. Foto sub nia kondiĉo ŝanĝota.

Beauregard par Cancon (France, Lot et Garonne) F-ino Emilienne Belloc, PI, PM, k. ĉ. l. Sendos saman nombron da francaj PM.

Berchem-Antwerpen. — S-ro A. Houben, Kemmelbergstraat 3, PM, PI bfl.

Bodenbach a.E. I. — 1014 (Ĉeĥoslovakio. S-ro Alfred Heinrich PI, L, PM.

Bohunice — St. Liskovec (Ĉeĥoslovakio) S-ro Labert Luniaczek, Zem, zahr. ovoc ustav, pri ĝardenistaj, fruktarabaj aferoj. Foto, L, PI, k.ĉ.l.

Boryslaw (Polujo) F-ino J. Ehrlich, skr. pocht. 167, 19 jara ĉarmulino PI, L, kun samideanoj ĉiulandaj. Deziras ricevi francajn precipe ilustritajn gazetojn. Povas sendi PM. Kiu abonos por ŝi la gazeton « L'Illustration » de Paris? Si rekompencos per PM kaj aliaj objektoj laŭdezire. Skribu tuj.

Bucuresti (Ruman.) S-ro Arpad Davidovic, str. Pascal, 18, PI k.ĉ.l.

Bzenec na Moravě (Ĉeĥoslov.) — S-ro Bedrich Kuhner PM, PI precipe kun Eŭropo, Oriento, Japanujo. Respondo garantiita.

Chichester (Brit. Sussex). S-ro A. T. Campbell, 5 North Walls, L PI k.ĉl. Korespondas ankaŭ franclingve.

Dabrowá Gor (Polujo). S-ro Jan Durnas, str. Narutowicza 36, L, PK pri laborista vivo k.ĉl. Gerte respondos.

Dabrowa Gor (Polujo). S-ro Czeslaw Rabenda, VD de UEA, str. Krol. Jadwigi 22 PK, L kun seriozaj korespondantoj de ĉ. l. Certe resp.

Danzig. — S-ro C. Schombacher, Kaninchenberg 14, L., kunprektaĵaj gesperantistoj ĉ. l. escepte Germanujo, pri naciaj moroj, floraro, faŭno, tekniko, industrio komerco, trafiko, turismo, sporto, literaturo & muziko.

Debreczen (Hungar). S-ro Ferenc Mogyorosi, Borz utca 7, PI, bfl. L. (k.ĉl. escepte mezeŭropanoj).

Eksjö (Sved.) S-ro Gunnar Furhammer, Johannesberg, L, PK pri religiaj kaj sociaj temoj.

Hirschberg (German, Silezio.) S-ro Georg Sieche, Berndtstr. 12, PI, k.ĉ.l. escepte Germanujo, ĉf. Mi sendas PI de l'Giganta Montaro.

Hradec Kralové (Ĉeĥoslov.) O. Sklenčka, CD de UEA serĉas korespondantojn por siaj studentoj kĉl krom la najbaraj!

Kameoka (Japanujo.) S-ro Angecu Ito, 26 jara, Ten' onkĵoo, dez. interŝanĝi ideojn, precipe kun balkanoj.

Kameoka (Japanujo.) S-ro Kanakuo Osaki, 24 jara, Uĉimaru, L, PK, k.ĉ.l. pri seriozaj temoj. Certe resp.

Köln-Bickendorf (German.) S-ro Schultze, Rochusstrasse 35, Esp. Leipzig N. 22. — S-ro Karl Preu, Pol. Mö. 4 B., PM., PI, gaz. gaz. PM minimume 300 nedifektitajn. Donas ankaŭ Danzig, Svedujon. (Esceptite Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Polujo.)

Liverpool (Angl.) F-ino E. J. Thatcher, 76 Langdale Road, Sefton Park k.ĉ.l. Precipe kun ĉinoj.

Lübeck (German.) D-ro Albin Möbusz, Falkenstrasse 12, serĉas **Mexico D. F.** — S-ro M. C. Rodriguez, D de UEA, Apartado 2482, PM k. ĉ. l. krom Centra Eŭropo kaj Usono. Ankaŭ sendas PK. Ne akceptas bagatelajojn. Certe respondos. poŝtajojn aŝrankitajn per maŝinstampajo, ne per Poŝtmarkoj. Li donas kontraŭe PM Esp. sigelmarkojn k.t.p.

Moskva (S.S.S.R.) F-ino Zinaida Saskina, 57 Bulvar Smolenski. Zooteĥnika Instituto, PI, L, naciaj gazetoj & agrikulturaĵ.

Mwanza (Afriko, Tanganjika Territory.) S-ro L.G. Tonini, PI, monumantoj, palacoj, naciaj kostumoj, ĉf.

North Carlton N 4 (Aŭstralio, Vic.) S-ro D. McInnes, 887 Rathdown Street, por tri junuloj ĉ. 21 jaraj LPK. Ne kolektas PM.

Nova Paka (Ĉeĥoslov.) F-ino Bozena Regalova, instruistino, Staropacka 67 PI, L pri arta, literaturo k.at. esperante, france, germane kaj eĥe.

Przno p. Jablůnka n.B. (Ĉeĥoslov.) S-ro Tomáš Machala, delegito de UEA L, PI kun naturgeamantoj en ĉ.l. Certe respondas.

Sambor (Polujo.) S-ro Jurzyna, Financa K. Direktoro, PM donas ĉiujn seriojn de Aŭstrio, Hungarujo, Bosnio, Polujo, Dancigo. Rekomendita sendo.

Schwachat b. Wien (Aŭstrio.) F-ino Thilde Kunze PI, L, PM, k.ĉ.l. escepte Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Germanio, Certe respondas.

Santa Fé (Argentino.) S-ro Alfonso Liguori, Alvear 4257, PI ĉf. k.ĉ.l. PM kun progresintaj filatelistoj laŭ Yvert (escepte Ĉeĥoslovakio).

Tarrasa (Hispan. Barĥa.) S-ro Raphael Fernandez, PI, PM, ĉf. k.ĉ.l. Tuj kaj certe respondas.

Teplitz-Schönau (Ĉeĥoslovakio.) F-ino Erna Zimmermann, juna knabino, Graupnergasse 4, L, PI, k.ĉ.l.

Torino (Italio.) S-ro Delprino Oreste, Via Montebello 9, L, PI.

Udine (Italio.) S-ro Edvardo Crainz, Via dei Teatri 10, PK, PM, k.ĉ.l. precipe kun orientaj landoj.

Uimaharju (Finlando.) S-ro Vilho Karttunen, L, PK kun geografistoj, fotografistoj, literaturistoj.

Warrington (Angl. Lancashire.) S-ro F. L. Martin, Belvoir, Stanley Ave. Gt. Sankey, PM laŭ Yvert 1928 k.ĉ. eŭropaj landoj, prefere rekomendite.

Westerhall i/W. (German.) S-ro Hans Hauwe, Elisabethstr. 6, PI k.ĉ.l.

Petoj kaj Proponoj

INTERNACIA KOMERCO

Adresŝanĝo. — Albin Johansson, antaŭe Valleberga — Ekeby, nun: Höganäs, Sandflysgatan, Sved.

Adresŝanĝo. — S-ro H. J. Tuinder, informas ke lia adreso deŝt unua de aŭgusto estas la jena: Departamento de Marino, Ned. Oost Indië kaj li volonte ree korespondos kun la antaŭ al gekorespondantoj.

Averta duafoja. — S-ro Antin Karatnyckij, videl, de UEA el Kolomea (Pollando) sciigas, ke sekvantaj anoncintoj malgraŭ kelkfoja peto kaj publikigo en «*Esperanto*» No. 328 (Dec. 1927 j.) je rekomendita sendaĵo kun poŝtmarkoj tute ne respondis:

Armand Vrancken, Anwerpen (Belgujo)

Cecil Lowther, Brunswick (Aŭstralio)
Takeo Karakawa, Kioto (Japanujo)
Ivan Naumov, Varna (Bulgarujo)
Ligierri de Lincam, Huesca (Hispanujo)
Nevzad Bej, Tire (Turkujo)

Mi avertas ĉiujn novajn korespondantojn, al kiuj mi sendis rekomenditajn leterojn kun poŝtmarkoj kaj kelkajn poŝtkartojn kun peto respondi kaj kiuj tion ne plenumis, ke ili estos anoncintaj kiel malutiligitaj de Esperanto Korespondado.

Deklaracio pri la Vero. — Se vi volas kompreni la Biblion kaj se vi interesigas pri baldaŭaj okazontoj kaj katastrofoj demandu senpagan libreton «*Deklaracio pri la Vero*» al: G. R. Martin, 43 Calmont Road, Bromley, Kent, Britlando.

Dommastrinon, serĉas A. J. Pettersson, Strandbaden pr. Sved.

Ekspozicio. — Japana Elementa Lernejo (famekonata lernejo en la urbo, Nagoya.) intencas aranĝi Ekspozicion de Desegnaĵoj, manfarotaj de geknaboj, en venonta Januaro. Tutmondaj Instruisto-Esperantistoj bonvole kolektu kaj sendu ĵin kun Esperanta klarigo por sciigi praktikecon de Esperanto al la fleksiganta lernejo. Interŝanĝon ankaŭ volonte akceptas. Adresu: S-ro Joŝii ĉe Meirin Shoogakkob, Nishiku, Nagoya, Japanio.

Filatelistoj. — Sendu diversajn PM mi sendas estonajn kaj latvaj. El Germanujo kaj Aŭstrio nur laŭ mankolisto. Katalogo Y. & T. kaj Michel 1928. S-ro J. Löhms, Puiestee t.4. Valga, Estonio.

Filatelistoj. — Mi interŝanĝas PM de Polio, Sovetlando, kaj Ukraino k.ĉ.l. Kalkulo laŭ Yvert & Tellier. T. Tomalik, P.W. P. Zagodzion, Bollando.

Filatelistoj. — Sendu al mia poŝtĉekkonto 24905 du sved. kronojn kaj mi sendos al vi kompletan serion de svedaj jubileaj PM 1928 neuzitajn. Dek serioj kostas 15 sv. kr. Letero kun la PM rekomendita, aŝrankita per la jubileaj PM. G.W. Rodinson, Jarlavägen 2, Gefle, Sved.

Olimpaj poŝtmarkoj. — Nia societo presigis foliojn kaj dank' al afabla permeso de la poŝtdirektoro, povis transdoni ilin al tiuj vizitantoj de la Ludoj, kiuj aĉetis Olimpajn poŝtmarkojn en la helpa poŝtoŝeĥejo Amsterdam-Stadion. Entute 8600 ekzempleroj estas donitaj kaj senditaj tra la tuta mondo.

Ni havas malgrandan provizon da tiuj folioj, ĉiu kun plena serio de 8 Olimpaj markoj, stampitaj per la speciala stampilo, kiu hazarde montras kvinpintan stelon kaj kiu post la 12a de Aŭgusto ne plu estas uzita. Ni disponigas ĉi tiun maloftaĵon kontraŭ kontribuo je niaj kostoj de presado k.t.p. La prezo por ĉiu folio estas por niaj membroj 2 guldenoj, por membroj de la Lab. Fed. kaj de la Katolika Ligo 3 guldenoj, por aliaj 5 guldenoj. Alsendo okazos ĝis elĉerpiĝo de la provizo per registrita letero. Pagoj al mia poŝtkonto 48345, Amsterdam.

Estas sendita ekzemplero al la Nederlanda Poŝtmuzeo laŭ peto de ĝia Direktoro.

Neuzitaj folioj estas senkoste haveblaj ĉe mi. Mi atentigas ke la Olimpaj poŝtmarkoj estas vendataj en la poŝtejoj ĝis 15 Septembro.

H. S. DONKER, Sekr., Ceintuurbaan 188, Amsterdam, Z.

Poŝtmark-katalogo. — Esperantistoj kolektantoj de poŝtmarkoj ni klopodu starigi la katalogojn nur en Esperanto. Amaso da opinioj nin helpas atingi la celon. Skribu al: Lienhardt & Naoumoff, 127, rue de Lille, Valenciennes, France, Nord.

Stampoj de Esp. grupoj societaj institutoj estas kolektataj de S-ro Robert de Kegel, D de UEA, Denterstraat 58, Aalst Belg. — Oni bonvolu sendi per PK.

Vitro-pentrado. — Pentri sur vitro ĉiu povas ellerni. Skriba kurso en Esperanto enhavanta tri paĝojn por Kĉ. 20.— kun pentrita glaso kiel specimeno. Aŝrankite sendas antaŭe sendita. mono F-ino Marie Görtlerova Praha — Nusle 207, Ĉeĥoslovakio.

Violonoj. — Mi deziras prezojn per kvantoj da dek-du de ligno por violonoj, alta kvalito. Supra kaj malsupra tabuloj kaj apartaj partoj de violinoj, prefere el Italujo.

Henri Walc, 716 Rhodes Av. Toronto 6, Kanado.

Lyon'a Internacia Foiro

4. - 17. de Marto 1929



Palaco de la Lyon'a Foiro — Galerio en la Grupo de Artaj Artikloj.

Al ĉiu petonto, la Foiro de Lyon sendos dokumentaron eldonitan tute en Esperanto, entenantan:

- 1 luksan broŝuron 20 — paĝan
- 10 sorbpaperojn
- 10 diversajn poŝtkartojn
- 50 kolorajn afiŝetojn.

Por la grupoj, la Foiro de Lyon aldonos 1 grandan afiŝon 75×105 cm., en Esperanto.

Fine, la interesatoj povos obteni, kontraŭ pago de 15 francaj frankoj, la oficialan katalogon kun ĝeneralaj rubrikoj en Esperanto.

Per speciala favoro, la firmoj aliĝintaj al U.E.A. ĉiel Komercaj Entreprenoj povos ĝin ricevi senpage.

Pro la limigita nombro de tiuj presajoj, estos prefere respondata al komercaspektaj leteroj anstataŭ al privataj poŝtkartoj.

**Skribu al : FOIRO INTERNACIA DE LYON, Esperanto-Fako
Rue Menestrier - LYON**

MAX ZISMANN

Rumanio - Bucuresti
Str. Carol, 9

TELEFONO : 368-91

Reprezentas kaj deziras reprezenti gravajn firmojn eksterlandajn por la vendado en Rumanio. Teksaĵoj, papervaroj, gumaj kaj elektraj artikoloj.

Esperanto korespondata & parolata.

Instruistoj de Esperanto

Ĉu vi jam vidis la novan lernolibron

Supera Kurso de Esperanto ?

Se ne, mendu ĝin en via landa ĉeflibrejo esperantista, au ĉe

D-ro Leopold Dreher, Krakow, Starowislna 37.

(Pollando)

La prezo de 1 ekz. 1 sv. frk.

La prezo de 10 ekz. 8 sv. frk.

La prezo de 30 ekz. 22.50 sv. frk.

Premio-Konkurso de 500 Fkr. sv. de Esperanto-Korespondado :

Por diskonigi nian ilustritan monatan gazeton inter la esperantistaro kaj por ebligi al esperantanoj verkantaj la ekspluatadon de siaj kapabloj, ni decidigis arangi la jenan premi-konkurson :

1. Premiitaj estas originalaj aŭ tradukaj artikoloj en Esperanto pri ia ajn temo, ne pli longaj ol 2000 vortoj.
2. Disdonotaj estas 50 premioj :

Unua premio: Unu skribaĵo unuakvalita « Mignon » kun germana, esperanta kaj aliaj skribaĵoj	187.50 Frk. Sv.
Dua premio: Unu oleopentraĵo, itala pejzaĝo	57.50 » »
Tria premio: En kontanta mono	50.00 » »
Kvara premio: En kontanta mono	25.00 » »
Kvina = Dudeka premioj: Po Kvin Frk.	80.00 » »
21 - 30 a premioj: Po una abono al E.K.	50.00 » »
31 - 50 a premioj: 1 libro en Esperanto laŭ elekto po 2.50 Frk.	50.00 » »

SUMO : Frk. Sv. 500.00 Frk. Sv.

3. Pri la disdono decidis la redakcio de E. K. Ĉia jurista procedo ne estas permesata.
4. La laboraĵoj estas sendotaj al la redakcio de E. K. kun surskribo « Konkurso ». Lasta dato estas la 15a de decembro 1928.
La nomoj de la premiitoj estas konatigitaj en januara numero de E. K.
5. La ricevitaj manuskriptoj fariĝos posedaĵo de la redakcio.
6. Rajtas partopreni ĉiu abonanto de E. K. per po unu laboraĵo. Jara abono Unu usona dolaro aŭ egalvaloro.

Esperanto-Korespondado, Ahornallee, 6 BRESLAU 18 (Germanlando)

Ĉiuj ŝkoltoj !

Ĉiuj amikoj de Ŝkoltismo !

abonu la internacian monatan gazeton ilustritan

SKOLTA HEROLDO

Oficiala organo de « Skolta Esperantista Ligo »

Abonprezo: 2 sv. fr.: Adreso:

Pastro Ramboux, 22, Cours Albert I, Paris VIII.

JUS APERIS:

BENITO MUSSOLINI

La Antikva Romo surmare

PREZO LIT. 8.—

La tuta profito de la eldonaĵo estas destinita al porinfana bonfaro

Mendojn al la Esperantista Presejo A. Paolet en S. Vito al Tagliamento, Friuli (Italia)